

Tra la Mondo

Tutmonda ilustrata Revuo esperantista

TRA LA MONDO · ESPERANTO · SEMAS · SIAJN · BONAJOJN ·
PLI FACILIGAS · LA · KOMERCAJN · INTERKILATOJN · KONIGAS ·
LA · INPAJN · ELTROVOJN · KUNHELPOS · POR · ANSTATAVI ·
DE · FRUKTODONA · PACO · LA · SANGAJN · BATALADOJN ·
KIUJ · DISSTRAS · HOMARON ·



Alegorio speciale verkita de Sinjoro Pillel, fama gravuristo de medaloj, sendita en la francan Roman lernejon post ricevo de 1^a granda premio.

Jara abono : 8 frankoj, ĉiulande. — Kvaronjara abono : 2.25 fr. — Unu kajero : 0 fr. 75 c.

ĜENERALA PLANO KAJ ENHAVO.

Literatura vivado: Pierre Corneille, la patro de l' franca tragedio, de Fino <i>O. Prudent</i> (Francujo).	Paĝo 1 ^a
Nuntempaĵoj: Ĉieaj eĥoj: Al la internacia Milan'a ekspozicio (Italujo). — Ekzekutoj en Varsovio, de <i>Kabe</i> (Polujo). — Henrik Ibsen, de <i>Nils Okland</i> (Norvegujo). — Esperanto kaj Pacifismo de <i>S^o Elie Ducommun</i> , el Genevo (Svisujo).	2 ^a
Sportoj: La Internacia kurado de Aŭtomobiloj: Granda Premio de l' A. C. F., de <i>L. de Guesnet</i> , el Châtres (Francujo).	2 ¹
Militistaro kaj Maristaro: La Holanda armeo, de <i>J. H. Salomon</i> (Holandujo).	4 ^a
Pri Esperanto: Ĉirkaŭ la Kongreso, de <i>A. Montrosier</i> , laŭ senperaj sciigoj de <i>S^{oj} Schneeberger, H. Hodler, P. Berthelot, Mallet</i> , (Svisujo), <i>Centra Oficejo, Th. Rousseau, Bord</i> , k. t. p. (Francujo).	5 ^a
Kroniko kaj Bibliografio, de <i>Steleto</i> : Gazetaro; Esperantistaj festoj;	6 ^a
En U. Ŝ. A. ; Germana Societo « Progreso »;	7 ^a
Milito kaj paco, kun leteroj de <i>Generalo Bailloud, kolonelo Ballandier</i> , de « <i>Oficio</i> ».	8 ^a
Teatra paĝo: « La Vesta' ulino » ĉe la arenoj de Béziers, de Fino <i>J. Flourens</i> .	9 ^a
Diversaj sciencoj (Historio): La Rochelle, de <i>Sam. Meyer</i> (Francujo).	10 ^a
Diversaĵoj: Mzab'o — Ghardaia, de <i>Leŭtenanto Lesne</i> (Alĝerio).	12 ^a
Turismo: Savoie, de Doktoro Coze, el Aix-les-Bains.	14 ^a
Felietono: La Torento el Ŝaŭmo, de <i>Daniel Lesueur</i> , esp. de <i>J. Flourens</i> (Francujo).	16 ^a

REDAKCIO kaj ADMINISTRACIO.

NUR Miksaĵoj, t. e.: ludoj, amuzaĵoj, problemoj kaj solvoj devas esti sendataj al S^o Brunet, 9, Cours Victor Hugo, Bordeaux, (France).

Manuskriptoj, kaj mendoj KUN MONO al:

Gazeto « Tra la Mondo », 15, Boulevard des Deux Gares, Meudon (S. et O), France.

Oni bonvolu sendi la monon poŝtmandate — Nur de landoj ne havantaj internaciajn mandatojn, aŭ por pago de specimenoj, ni akceptas poŝtmarkojn, plenvalore.

PRI NIA UNUA JARO.

La ricevo de l' reabonigoj estis tre ofte por ni okazo vidi ke « Tra la Mondo » estas ŝatata de sia gelegantaro:

« Ĉiu, certe, ĝin atendas senpacience, kiel mi mem faras ».

PASTRO ŜIRJAEV (Rusujo).

« La enhavon de *Tra la Mondo* mi multe ŝatas, kaj plene gratulas vin, ke vi sukcesis fari en mallonga tempo la plej bonan revuon esperantan ».

H. HODLER, red. de « Juna Esperantisto ».
(Svisujo).

« *Tra la Mondo* estas la plej bona pruvo de la disvastiĝo de Esperanto en la tuta civilizita mondo. La artikoloj estas tre interesaj kaj instruantaj, kaj la ilustraĵoj helpas fari de ĝi rimarkindan aldonon al la internacia literaturo ».

C. CLASSEN (Nov-Yorko).

« Kvankam mia reabono estas la pruvo, ke via ĵurnalo plaĉas al mi, permesu ke mi insistas oferante al vi miajn komplimentojn por la laŭdinda celo kiun vi sekvas, kaj la briega rezultato kiun vi atingis ».

L. BEAUMEL, (Francujo).

« Ĉiam grandinterese mi legas *Tra la Mondo*. Ĝia eco de Ilustrato distingas ĝin de ĉiuj aliaj Esp^{aj} revuoj, kaj ŝajnas al mi speciale taŭga por la propagando ».

E. BEUVE, Franca instruisto.

« Mi legis kun sincera bedaŭro ke via unua jaro kostis multe, sed mi esperas ke via meritplena revuo fariĝos pli kaj pli sukcesa rilate al la enspezoj. Jam ĝi plene sukcesas rilate al la intereso, utilo kaj aparta propaganda valoro ».

G. DOUGLAS BUCHANAN (Skotlando).

Reabono.

Kelkaj personoj ne jam sendis sian reabonmonon. Ĉar ni havas nur abonojn pagantajn, ni supozas ke tiu prokrasto devenas nur de forgeso aŭ maldiligento. Do ni sendis tamen la 1^{an} n^{on} de nia 2^a Jaro. Sed pro la kosto de nia revuo, kaj la neebleco de kalkultenado, ni nepre ne sendos la kongresan numeron al tiuj, kiuj ne tuj sendos sian abonan renovigon.

Niaj poŝtaj abonoj.

Ni rememorigas ke oni povas aboni aŭ reaboni, *sen pluigaj elspezoj*, en ĉiuj francaj poŝtofficjoj.

Sufiĉas prezentiĝi en iu ajn el ili, peti abonon aŭ reabonon, rememorigante la oficiston, se estas necese, ke « Tra la Mondo » estas enskribita sur la 144^a listo (1^a de Januaro 1906) por la poŝtaj abonoj.

NIA VENONTA PROJEKTITA NUMERO.

La ruinoj de Wisby, de P. Hedstrom (**Svedujo**). — Gül Baba, de Altenburger (**Hungarujo**). — Blanka Cemento, kun priskribo de... surprizo por la Esperantistoj en Genevo, de Pastro Schneeberger (**Svisujo**). — La Tarantelo, itala danco, de Grafo Gallois (**Italujo**). — La Cedarbaro de Teniet-el-Haad, de S^o Mende (**Alĝerio**). — La Skotlanda Glavdanco, de C. Slater (**Anglujo**). — Siberiaj kaj francaj infanoj esperantistaj. — Virina Paĝo: La Modo. — Felietono: **Poŝta Amo**, hispana novelo, trad. de Johano Garcia Martin. — Rembrandt, kun belegaj ilustraĵoj; eltiraĵo el la Memorskriboj de Mistral, la fama franca poeto. — k. t. p.

La Patro de la franca Tragedio!

PIERRE CORNEILLE.

Laste, Francujo gloris la trian centjaron de la granda poeto nomita « La Patro de la Tragedio franca »: PIERRE CORNEILLE.

La tuta franca gazetaro parolis pri la festoj okazintaj en Rouen (Rueno), l'urbo kie la fama aŭtoro naskiĝis, kaj en Paris (Parizo): pri la statuo konstruita en la Panteono, (monumento kiun Francujo difinis por siaj eminentuloj), kaj pri la verkoj, kiujn multaj teatroj reludis je l'okazo.

« Tra la Mondo » estas feliĉa dediĉo, ankaŭ, unu paĝon al la genia viro, kaj legigi ĝin tra la mondo esperanta.

Corneille (Kornej') estis feliĉa homo: kvankam kelkaj legendoj disrakontiĝas pri li, lia sola historio estas tiu de liaj verkoj. Naskita en Rouen (Rueno) la 6an de Junio 1606, filo de advokato, li estis difinita por l'advokataro. Sed, akceptita advokato, li ne malfruiĝis forlasi preparoladon por teatro.

Lia unua verko estas komedio: *Mélite* (Melit'), ne bela verko, sed kiu atestis gravajn ecojn scenajn, kaj kiu sukcesis.

Li verkis kelkajn aliajn teatraĵojn ankoraŭ, inter ili: *Médée*, tragedio imitita laŭ Sénèque (Seneko), kie la genio de l'aŭtoro estas tradukita per altega krio. — « Via lando malamegas vin, diras Nérine (Nerin'); via edzo estas senhonora. En tiel granda malfeliĉo, kio restas al vi? » — Kaj Médée respondas unu vorton: « Mi! »

Sed la unua ĉefverko de Corneille estas *Le Cid* (Sid), kies temon li prunteprenis de Guilhem de Castro, hispana aŭtoro.

Prezentata sur la scenejo en 1636, tiu ĉi tragedio havis sukceson resonantan; l'entuziasmo pri ĝi elfluogis.


« Bela tiel, kiel *Le Cid* » iĝis la frazo, kiu tradukis l'admirecon la plej egan.

Ja, tiu ĉi teatraĵo alportis al nia franca scenejo la kvalitojn, kiuj, ĝis tiam, mankis al ĝi: l' *unuecon de tempo, de loko, de ago* (regulo, kiu estis ĉiam poste aplikata); historian interesan agon, eble ne tute precizan, sed koloratan kaj viglan; personojn simpatiajn kaj pasiajn: *Rodrigue* (Rodrig'), *Chimène* (Simen'), don *Diègue* (Dieg'), kiujn ni sentas vivi kaj kiuj kortuŝas nin.


La grandega sukceso de *Le Cid* naskis



LA FAMA BUSTO DE CORNEILLE, DE CAFFIERI. Fajrcambro de la « Franca Teatro ».



LA NASKIĜA DOMO DE L' POETO EN ROUEN.



LA DOMO KIE MORTIS CORNEILLE EN PARIZO.

kontraŭ l' admirinda verkaĵo nubegon el enviuloj kaj malbonuloj

Corneille defendiĝis kun fiera supereco kaj konfuzis siajn malamikojn plej bona maniere: produktante sekvon da novaj ĉefverkoj.

Per *Le Cid*, li al militis la kavaliran mezepokon; per *Horace* (Horas') kaj *Cinna* (Sinna) (1640), li prenis posedon de l' roma antikveco; per *Polyeucte*, de la kristana antikveco (1640). La egaj altoj de Belegeco estis atingitaj!

Post tiuj kvar nekompareblaj verkoj, Corneille verkis ankoraŭ kelkajn valorajn teatraĵojn: *La Mort de Pompée* (1643); — unu komedion: *Le Menteur* (La Mensogulo); *Rodogune* (1646); *Nicomède* (Nikomede') (1652), ĉefverko ankaŭ.

Malfeliĉe, tiu geniulo rapide ekmalfortiĝis, kaj liaj postaj verkoj portas la signojn de l' maljuneco.

Sed li estas l' aŭtoro de « *Le Cid* » kaj la *Patro de la franca Tragedio*!

La ĉefa marko de l' Corneilla genio estas la *Heroeco*. Corneille havas altegan komprenon de l' homaro.

La plimulto el la personoj de liaj verkoj subtenas bataladon inter la pasio kaj la devo. Corneille ne akceptas, ke, iafoje, la pasio venkas la devon. Ĉiam liaj herooj klare vidas tion, kion ili devas fari; apenaŭ li permesas, ke ili ŝanceliĝas por plenumi la bonon.

Ĉiu el liaj teatraĵoj laŭdegas kortuŝantan senton. En *Le Cid*, Corneille gloras la honoron; en *Horace*, la patriotismon; en *Cinna*, la grandanimo; en *Polyeucte*, l' oferon al dia idealo.

La paroloj, kiujn li pruntas al siaj tiel fieraj maljunuloj, tiel bravaj viroj, tiel fortaj virinoj, estas admirindaj signoj de karaktero.

Cetere, ĉe Corneille, malgraŭ kelkaj eraroj pri gusto, la dialogo preskaŭ ĉiam estas lerta, brila, elokventa; la belaj vortoj ŝufiĉegas, kaj la penso fortika tradukiĝas ofte per versoj presitaj kiel medaloj.

Oni nomis la teatraĵaron de Pierre Corneille: Lernejo de grandanimo.

Ni relegu ĝin, por ke la belaj partoj de nia animo lumiĝu per l' ekzemplo de ĝiaj herooj, kaj ke niaj altaj sentoj kresku per ilia kontakto.

ODILINO PRUDENT.

Paray-le-Monial.

Speciale verkita por « Tra la Mondo ».




Vojaĝoj organizitaj al la Internacia Ekspozicio de Milan.

La nova Simplona tunelo malfermiĝis oficiale antaŭ 2 monatoj kun plena sukceso, kaj multaj festoj solenis tiun novan venkon de l' inĝeniera arto je la naturo.

Nun oni povas utiligi tiun vojon por iri Milano'n kaj viziti la internacian ekspozicion pri kiu iam ni parolis.

Por ebligi ĝin viziti malkare, la franca kompanio P. L. M. liveras, ĝis la 15^a de novembro 1906, irajn kaj reirajn biletojn (1^a, 2^a kaj 3^a klasoj) al Domodossola, uzeblajn 30 tagojn, kune kun irajn kaj reirajn biletojn de Domodossola al Milan, uzeblajn 20 tagojn.

La uzebleca daŭro de tiuj biletoj ne estas plilongigeblaj.



LA TUNELO DE SIMPLON.
Enirejo ĉe Iselle (Italujo).

Ekzekutoj en Varsovio.

Jam estis en Varsovio konstanta registara ekzekutisto, sed ĉar la leĝo rezervas la mortpunon nur por maloftaj okazoj dum la milita stato, la ofico jam ne ekzistas de multaj jaroj. En la lasta tempo la maloftaj okazoj fariĝis tiel oftaj, ke pro manko de specialisto la oficon plenumas ekzekutistoj-amantoj, kiuj, inkognite, en maskoj venas en la varsovian citadelon kaj demandas, ĉu oni ne havas por ili «laboron.» Por pendelo de unu kondamnitito la ekzekutisto-amanto ricevas 50 rub (133 fr.) kaj, pro la bona honorario, kiel lidatoj mankas neniam.

Antaŭ la ekzekuto oni demandas la kondamniton, ĉu li volas ricevi la komunion, kaj en okazo de jesa respondo oni enkondukas militistan pastron; la plimulto da kondamnititoj aŭ tute malakceptas la proponon aŭ postulas pastron ne militistan.

La ekzekuto okazas ordinare ĉe la tagiĝo. La loko de l' ekzekutoj estas sur placeto post la malliberejo por politikaj krimuloj («*ar pawilon*»). Tie oni starigas pendigilon; ĝi estas nigra kaj sub ĝi kuŝas podio ankaŭ nigra. Taĉmento da soldatoj kondukas la kondamniton, kies manoj estas kunligitaj sur la dorso; li estas vestita nur per tola ĉemizo kun kapuĉo kovranta la okulojn. La soldatoj igas la kondamniton suriri la podion. Nun komenciĝas la laboro de l' ekzekutisto, kiu surmetas laĉon sur la kolon de l' kondamnitito, rapide desaltas de la podio kaj forpuŝas ĝin.

La kondamnitito ekpendis. Sur lia korpo kuras refleksoj, en la komenco rapidaj, poste pli kaj pli rapidaj, ĝis fine la morto kvietigas la malfeliĉulon. La leĝo lasas 10 minutojn por la agonio, sed ordinare la korpo de la pendigito restas duonon da horo, post kiu oni tratranĉas la ŝnuron. La korpo falas teren kaj estas forportata en la tombejon, kien oni ĵetas ĝin, sen ĉerko, en antaŭe preparitan kavon. La kondamnititoj al pafmorto estas enterigitaj en ĉerkoj.

Plena jam estas la citadela tombejo; ĉu longe ankoraŭ daŭros la laboro de l' ekzekutistoj-amantoj?

KABE.

Varsovio, 18 Junio 1906.

La Parlamentanoj demokratiaj.

La 17^{an} de Julio malfermiĝis ĝenerala kunveno de l' reprezentantoj de l' demokratiaj partioj de l' Eŭropaj Parlamentoj, en Exeter Hall (Londono). Ĉeestis reprezentantoj de l' socialistaj kaj demokratiaj partioj de Belĝujo, Holandujo, Francujo, Anglujo, Germanujo, Aŭstrujo, Hungarujo, Italujo, Svisujo, kaj ano de Dumo.

La programo de tiu kunsido enhavas diskuton pri la jenaj temoj; pli bona metodo por komuna agado, agante per samtempaj protestoj en la diverslandaj Parlamentoj; la rusa revolucio kaj la situacio de la demokrato rilate la konferencoj por la paco.

«*Le Journal*», 18 VII/06.

La Internacia Kurado de Aŭtomobiloj. — Granda Premio de l' A. C. F.

De kelkaj jaroj, ĉiujare, okazas granda internacia kurado de aŭtomobiloj. El tiuj la plej fama estis ĝis nun la «*Pokalo Gordon-Bennett*» ĉe kiu ĉiu nacio povas reprezentiĝi po sole tri veturiloj konstruitaj tute en sia lando. En ses fojoj ĝi estis gajnata kvarfoje de Francujo, la du lastajn jarojn sinsekve de Thery sur aŭtomobilo Richard-Brasier. Anglujo kaj Germanujo venkis ĉiu unu fojon. Tiu regularo malkontentigis Francojn kaj Italojn, kies aŭtomobila industrio estas pli grava ol ali-

lande. De tiu afero naskiĝis la «*Granda Premio de la Aŭtomobila-Klubo de Francujo (A. C. F.)*, en kiu povas kuri ĉiu firmo po tri veturiloj.

Tiu belega kurado okazis sur la triangula «*Ĉirkaŭo*» (vojaroj) inter la urboj Le Mans, la Ferté Bernard kaj St Calais, en la Departemento La Sarthe. Oni elkuris ses fojojn ĉiutage la longon 104 km., dum du tagoj, la 26^{an} kaj 27^{an} de Junio.

Ni provu doni priskribeton de tiu senegala spektaklo:

Henrik Ibsen.

Originale por «TRA LA MONDO».

Li ne vivas plu, li, kiu alportis al sia patrujo tiom da gloro, al la tuta homaro tiom da utilaĵoj; li, kiu donis al la tuta monda literaturo trezorojn, kiuj neniam senvalorigos.

Estas, kvazaŭ ni ne povus kredi tion, ke li ne plu loĝas ĉe ni; kaj tamen — li nun estas foririnta el la lando de l' vivantoj, kaj neniam li revenos.

Henrik Ibsen estis heroo de l' penso kaj de l' agemeco. Per la klareco de siaj pensoj kaj per gravaj bataloj li atingis siajn grandajn venkojn.

.... kaj nun li ne vivas plu. Lia popolo ploras, kaj la tuta civilizata mondo ploras sur la rando de lia tombo.

Ploras — kaj dankas.

NILS ÖKLAND.

Haugesund, Norvegujo.

En venonta artikolo mi parolos pli detale pri lia vivo kaj lia verkaro.



Esperanto kaj Pacifismo.

Plezure ni enpresas la jenan leteron de S^o Elie Ducommun, la eminenta Sekretario de «*Internacia oficejo por la Paco*».

Sinjoro,

«*Ni dankas vin pri la sendo de l' n^o de via interesa revuo, kiu enhavas l' artikolon de Sin^o Baronino von Suttner. Ni ne mankos ĝin anonci en unu el la proksimaj numeroj de «Correspondance bi-mensuelle», organo de nia ofico.*

Ni estas ĉiam feliĉaj vidante Esperanton utilan por la profito de l' pacifismo, kaj ni kredas, ke ĝi povas fari grandegajn servojn al nia afero, precipe en landoj kaj mezoj, en kiuj ĝis nun ĝi ne povis enpenetri.

Bonvolu akcepti, k. t. p.

Berne, 11^{an} de Julio 06.

ELIE DUCOMMUN.

Dum la kongresa epoko.

Oni bonvolu skribi al ni, dum la kongresa epoko, nur por neprokrasteblaj aferoj, por sendo de manuskriptoj, aŭ por aferoj ne postulantaj respondon. Ni rememorigas ke, ĉiutempe, ni respondas nur al leteroj enhavantaj postmarkon por la respondo.



De monteto stariganta en la blindigo de l' suno, la vojo de l' « Ĉirkaŭo » defluas kruta la celon kaj tribunojn. Inter siaj herbaj bedoj ĝi briletas, nigra per la gudrono disverŝita por malhelpi la polvon. Subite, inter la lumoj de l' supro, malgranda ombro aperas en ronko, kliniĝas, ruliĝas kiel globo sur la vojo. La punkto dikiĝas, larĝiĝas kaj kiam ĝi trafas la ebenaĵon oni ekvidas veturilon, kiel fulmo, kun cifero kaj litero, kiun oni salutas per longaj ekkriadoj. Du homoj rajdas sur la aŭtomobilo potenca, kun la okuloj ŝirmitaj per dikaj okulvitroj: la kondukisto, tenanta sin torte je la gvidila rado, apude la mehanisto sidanta sur seĝeto; kaj poste, kiel




kronegoj, la ŝangeblaj pneŭmatikoj. Tiuj veraj herooj iradas meze la ventturniĝoj je siaj oreloj, nezorgantaj pri la danĝero, kun sola ideo en la kapo « Ĉiam pli rapide, venkonte por sia nacio! sia firmo! »

Tridek du ĉefverkaj veturiloj foririntaj; dekunu je la celo! Tio montras la malfacilecegon de l' kurado; ĉar ĉiuj veturiloj estis la plej bonaj de Francujo, Italujo kaj Germanujo!

La unua, Szisz, (aŭtomobilo franca, RENAULT fratroj), elfaris la 1236 km. en 12 H. 14 m. 47 s. Ĝia meza rapideco estis 101 km. 560 en la horo. La 105 meĥ-ĉev de la motoro puŝegis la veturilon je mirinda reguleco de

Sportoj.



kronometro. La batalo estis varmega kaj interese inter la dua kaj la tria: la Italo Nazzaro sur 110 m. ĉ. FIAT kaj la Franco Albert Clément sur 125 m. ĉ. BAYARD CLÉMENT, je kvar minutoj nur unu de l' alia. Okazis nur unu sola malfeliĉo grava: kŭristo Teste havis la femuron rompitan per la falo de sia veturilo.

La spektaklo estis mirinda por la rigardantoj malgraŭ varmo laciga kaj premanta.

Kiaj homoj, tiuj kŭristoj! Oni laŭdas la multimajn pionirojn irantajn tra la nekonataj landoj plenaj je insidoj. La kondukistoj kaj la mehanistoj de la aŭtomobilaj kuradoj jetas sin, ili ankaŭ, en turnon, kie morto sek-



vas kaj tuŝetas ilin ĉiupaŝe. Ili estas viroj, herooj, kaj ni devas admiri ilin kaj la aŭtomobilan sporton, la plej bela kaj interesa el la modernaj sportoj, ĉar ĝi montras mirinde la genion de l' homo utiliganta la naturajn fortojn!

Originale verkita de
L. DE GUESNET
Chartres.

Ni ŝuldas tiun kliŝaĵon al l' afableco de nia granda franca kunfrato « Les Sports » ĉiam bonege informata pri ĉio, kio rilatas la ĉiusecajn sportojn.

Kl. « Les Sports ».

SZISZ SUR « RENAULT » (Supre). — NAZZARO SUR « FIAT » Malsupre.



LA FIDELECA ĴURO.

Kopirajto.

La Nova Organizacio de la Holanda Armeo.

Verkita de J. H. SALOMON, Eks-Leŭtenanto Holanda.

Oni ne povas elparoli la nomon Holandujo ne revante pri la glora rolo ludita iam de tiu lando en la milita historio de Eŭropo. Kvankam la grandmilita epoko ne plu estas por ĝi, tamen Holandujo havas daŭran armeon. Pri ĝi eksoficio holanda bonvolis diri kelkajn vortojn, interesajn por ĉiuj.

Post kelke da monatoj estos finiĝinta la nova militistara organizacio en Holandujo. Tio ŝajnas granda plifortigo, ke la malgranda Holandujo estos posedanta unu tutan divizion plu, konsistantan el infanterio, kavalerio kaj artilerio, precipe se oni scias ke pli frue ekzistis nur tri divizioj. La forto do ŝajnas altigota je triona parto. Tamen tio ne estas vera!

Divizio konsistas el tri infanteriaj regimentoj; do, antaŭe, ekzistis naŭ regimentoj. Nuntempe ekzistas efektive dekdu infanteriaj regimentoj, sed dum pli frue regimento konsistis el kvin batalionoj, nun ĝi enhavas nur kvar. La tri novaj regimentoj do estos formitaj parte el jam ekzistantaj malnovaj regimentoj, kaj la tuta plifortigo infanteria nur estas tri novaj batalionoj, anstataŭ tri novaj regimentoj.

La kavalerio konsistas el unu regimento por ĉiu divizio. Ĉiu regimento pli frue havis kvin skadrojn kaj nuntempe nur kvar. La plifortigo je unu regimento do estas propra plifortigo je unu skadro.

Nur en la kampartilero la nombron de ses baterioj po regimento oni ne povis plimalmultigi pro taktitaj kaŭzoj; kaj tuta nova regimento estas kreita.

Tre interesa tamen estas la rifuzigo de la burĝa gvardio, kiu ne havis ian militistan utilecon aŭ meriton. La burĝa gvardio ne estas plu kaj ĉiuj estas gojigitaj: la armeo kaj la eksmembroj de la burĝa gvardio. Anstataŭ, oni kreis la « landweer » aŭ teritorialan armeon, kies soldatoj ĉiuj servis jam sep jarojn en la regula armeo kvankam ne senhalte.

Povas iĝi oficiroj en la « landweer » 1) la eksofi-

ciroj (pensionataj aŭ memvole ekzistantaj) el la regula armeo, 2) malmulte da meritaj eksoficiroj de la burĝa gvardio, 3) multe da ekssuboficiroj el la armeo, 4) rezervaj-oficiroj (vidu sube).

La « landweer » konsistas el infanterio kaj artilerio, kaj la regno estas dividita en 48 « landweer » — distriktoj.

La rezervaj oficiroj. En Holandujo ne ekzistas apartaj rezervaj batalionoj, sed la rezervaj oficiroj venas por ekzerco en unu el la diversaj regimentoj.

Povas iĝi rezervaj oficiroj: 1) la eksoficiroj de la regula armeo, aŭ 2) la rezervaj suboficiroj.

Ankoraŭ alia speco de oficiroj estas la konskritaj oficiroj. Konskritaj serĝentoj povas iĝi leŭtenanto post unujara servado en sia rango.

Oni vidas ke la organizacio estas nesimpla; kaj tiu ĉi malgranda armeo posedas kvar specojn da oficiroj. La kaŭzo de tio estas la manko de profesiaj oficiroj. Preskaŭ ĉiam mankas 8 je cento el la infanteriaj leŭtenantoj kaj 18 je cento el la artileriaj.

Ĉiu oficiro el la kvar specoj, post oficirigo, ĵuras fidelecon al la reĝino, obeecon al la leĝoj kaj submetigon al la disciplino. Tio ĉi okazas solene sub la standardo antaŭ la fronto de la trupo. Aldonita ilustraĵo prezentas oficiron, preta fari la ĵuron, la standardon en la maldekstra mano. Ĉevale estas la regimentestro kaj lia adjutanto, dum sur la antaŭaĵo estas la standardportisto.

Dek novaj oficiroj estis ĵurintaj, kaj oni vidas parton de unu bataliono.

J. H. SALOMON,
Eks-Leŭtenanto Holanda.

Ĉirkaŭ la Kongreso.

Post unu monato malfermiĝos nia dua universala Kongreso. Laŭ la aktiveco montrita ĝis nun, oni povas esperi grandan sukceson. Ni jam diris, kiel aktive laboradas: ĉiuj niaj svisaj amikoj — por ke ni trovu, laŭ l' esprimo de Pastro Schneeberger, Prez^o de l' « S. E. S. », « tute esperantiĝintajn landon kaj urbon»; kaj la Ĝeneva Komitato, — por sia speciala laborego.

Ilin helpas nia fervora franca propagandisto, S^o Th. Rousseau, kiu atingis gravan rezulton:

S^o Th. Hopf, farmacisto en Adelbogen, apud Interlaken, esperantistigita de li, preparas esperantan broŝureton pri Berna Oberlando; kaj eble la Lucerna grupo sekvos tiun ekzemplon.

Tiuj broŝuroj, sendotaj al ĉiuj esperantaj grupoj por disdoniĝi, estos rimarkindaj propagandiloj por nia lingvo, tiom pli ke la superemo instigos certe iniciativajn sindikatojn same fari.

S^o Hopf verkas germane, kaj S^o Rousseau estas verkanta france kaj Esperante, artikolojn en Thun'a gazeto por fremduloj.

Siaflanke, malnova bulgara samideano, S^o Avramof, nune en Clavadel (Svisujo) penadas disvastigi Esperanton ĉe l' fremdaj turistoj per ĉiulingvaj « Ĉefeĉoj ».

Certe, dank'al tia kombinata agado, la tuta Svisujo esperantiĝos.

Dank' al la afableco de S^o Ed. Mallet, Viepr. de la « S. E. S. » ni povas doni vidaĵon de l' « Kongresa Oficejo » en Ĝenevo, kun la portretoj de S^o P. Berthelot, redaktoro de « Esperanto-Journal » en Ĝenevo, kaj de nia kunlaboranto, G. Chavet, Sek. de l' « Centra Oficejo » en Parizo kaj deligitoj en Ĝenevon, antaŭ kelkaj semajnoj, por la preparado de l' Kongreso.

Kiel estas videble, la « Ĝeneva kongresa oficejo » estas mirinde lokita sur vizitata kajo, en bela domo, kaj aranĝita por altiri la atenton. Ĝia laboro estas grandega kaj ankaŭ la elspezoj: senfina korespondado, eldono kaj sendo de cirkuleroj; agado apud la nacia gazetaroj, kies apogo estas necesa; eldono de afiŝoj; preparado de festoj; organizado de ekspozicio.

Tiu ekspozicio, precipe komerca, malfermiĝis la 15^a de Junio kaj enhavas multajn pruvojn pri la disvastiĝo de Esperanto ĉe la komercistaro, tio estas pri ĝia praktikeco. Ĝi do tute taŭgas por altiri la atenton de l' multaj vizitantoj de la bela urbo Ĝenevo.

Pro tiuj elspezoj, kiuj estas tute necesaj por ke niaj Kongresoj iĝu pli kaj pli brilaj, kaj por ke, pli kaj pli, ili estu indaj je l' atento de l' gravaj naciaj gazetoj, estas necesege ke la Esperantistoj amase ĉeestu kaj sensancele pagu la malgrandan kotizaĵon fiksitajn. Ni memoru ke la kosto de l' kartoj estas 10 fr. por la Kongresistoj kaj 5 fr. por la nuraj ĉeestantoj. La unuaj havas la rajton partopreni en la voĉdonadoj kaj festoj, kaj ricevas ĉiujn kongresajn dokumentojn; la duaĵ havas la samajn rajtojn sed ne voĉdonos nek ricevos la dokumentojn.

Kiel diras prave S^o de Beaufront en la lasta « Esperantiste », tiu el ni kiu ne penadas alporti sian kunagadon al la tri organizantaj oficejoj: Ĝeneva Komitato, Organiza Komitato kaj Centra Oficejo, meritis vere mal multe sian nomon.

Tial, kum iom da miro ni legis en revuo, kiu titolas sin « Revuo por Esperanto », artikolon kritikan kontraŭ la prezo de l' karto. La aŭtoro diras, ke la kartoj kostis nur 3 fr. en Bulonjo, sed li forgesas ke, je la fino de l' Kongreso, restis deficiente. Eble ĝi malaperis per la vendo de l' Kongresa broŝuro kaj memoraj dokumentoj (pri tio ni ne scias), sed estas necesege ke tia deficiente ne okazu tiun ĉi jaron, kaj estas timeble ke ĝi ekzistas ankoraŭ, se multaj revuoj agas kiel faris la aludita.

Kiam oni faras specialan vojaĝon por iri Ĝenevon, sajnias malfacile kredeble ke oni ŝancelu elspezi 5 fr. anstataŭ 3, aŭ 10 fr. anstataŭ la kosto de l' karto (3 fr.) kaj de l' dokumentoj, kiujn oni devis aĉeti en Bulonjo.

Eĉ, ni esperas ke kelkaj personoj deziros alporti pluan monferon por pligrandigi la sukceson de l' Kongreso, kaj ni transsendos plezure tiujn, kiujn oni bonvolos sendi al ni.

Pastro Schneeberger, kiu tiel ĝuste stenografis la tutajn paroladojn de l' lasta Kongreso organizas stenografan oficon. Ni plezure enpresas la jenan sciigon.

Stenografita Oficejo dum la Ĝeneva kongreso.

Bonaj Esperanto-stenografistoj, precipe stolze-schrejanaj, kiuj venos kongreson kaj deziras helpi la verkadon de plene *detala raporto* pri la oficialaj paroladoj kaj la diskutadoj por ĉiutaga kongresa organo aŭ eldonota kongresa libro, sendu kiel eble plej baldaŭ sian aliĝon al la

Oficejo de Esperanto kaj Stenografo, Laŭfon (Svisujo).

Oni bezonas 4 ĝis 6 personojn, kies skribrapideco certa estas almenaŭ 180 ĝis 200 silaboj minuite. Aliĝojn al ĝenerala kunveno de stenografistoj, al sama adreso.

Tagoro de l' kunsidoj. — La esperantista organiza komitato helpinta en la dissendo de cirkuleroj celantaj okazigi kaj kolekti aliĝojn al la kongreso, ageme okupiĝis ankaŭ por havigi al la kongresanoj faciligojn de vojaĝo kaj restado.

La ĉefaj fervojaj kompanioj konsentis 50 % da rabato por la vojaĝo de la kongresanoj, kies daŭro povos esti, laŭvole, pli aŭ malpli longa, maksimume dusemajna, de la 24^a de aŭgusto ĝis la 8^a de septembro. Ĉar la daŭro de la kongreso mem ampleksos apenaŭ unu semajnon, de la

28^a de Aŭgusto ĝis la 1^a de Septembro, la kongresanoj krom la plezuro de l' Esperantista kunveno, ĝuos sen granda elspezo la facilecon ekskursadi en Svisujo.

Nun ĝilaboras je l' preparo de l' tagordo kaj programo de la laboraj kunsidoj de la kongreso

Kvankam la dato fiksitita por la lasta sendo de l' proponoj estis la 15^a de Julio, eble oni povos ankoraŭ sendi, kompreneble *senprokraste*, la proponojn aparte gravajn.

Aliparte, la Organiza Komitato preparas raporton pri la nuna stato de Esperanto en la tutmondo: Ĉiuj naciaj societoj kaj regionaj grupoj estas petataj sendi TUJ: la proksimuman nombron de siaj adeptoj, sian celon, la nombron kaj la gravecon de l' kursoj farataj, k. t. p.

Restado en Ĝenevo. — Por certigi al la kongresanoj certan kaj konvenan loĝadon, la Ĝeneva organiza Komitato instigas ilin tuj sendi ilian kotizaĵon kun peto por kongresaj kartoj, kaj aldoni *almenaŭ* tri frankojn por ĉiu nokto.

La grupoj aŭ lernantaroj, kiuj deziras loĝi en komunaj dormejoj (je tre malkara prezo), devas sendi oficialan demandan leteron *kun precizaj detaloj* al la Loka Komitato, kiu respondos per ĉiuj necesaj sciigoj.

Oni povas tagmanĝi por 2 fr., kaj vespermanĝi por 3 fr. (kun trinkaĵo) — Ekzistas ankaŭ grandaj Popolaj Restoracioj, kie oni povas havi simplan, sed bonan manĝon por 0 fr. 60.

Teatra Vespero (29^a Aŭg.) kaj Balo (31^a Aŭg.) — Ĉiuj grupoj aŭ izoluloj intencantaj kanti, deklami aŭ ludi, bonvolu de nun sin enskribigi kaj sendi la tekston de la verkoj, kiujn ili intencas prezenti.

La Komitato petas, ke multaj kongresanoj alportu naciajn kostumojn por tiu balo. Ni varmege apogas tiun peton. Oni bonvolu relegi la interesan artikolon de D^o Ing^o Pourcines pri la nacikostuma balo en Bulonjo, kaj oni meditu nian diron « Ni estu pitoreskaj ».

Kelkaj vizitantoj.

Al ni estos facile plenumi tiun programon:

Jam de ĉiuj partoj de la mondo, eĉ de Kalkutta, venas multaj aliĝoj de novaj partoprenantoj en la Kongreso. Inter la malnovaj, kiuj kompreneble revenas memorante la plezuron de la pasinta jaro, oni povas elekti grandan citindan nomaron en l' oficiala etato. Ni povas diri ke ni plezure vidos en Ĝenevo, kiel ni plezure vidis en Bulonjo, la ĉefajn Esperantistojn de ĉiu lando. Ekzemple venos: S^{ino} Adelo Schafer; Josefo Jamin; Lucien Blanche; Eduard Kühnl; Carlo Bourlet; Maurice Duchochois; gesinjoroj Montrosier; S^{ino} José Guivy; Ricardo Codorniu; Aleksio Zinoviev; Evstifejev; Middlems kaj Pilgrim (Kalkutta) k. t. p.

El letero de « Centra Oficejo ».



Fot. Mallet.

LA KONGRESA OFICEJO EN ĜENEVO.

Kroniko.

Siaflanke, S^o G. Chavet bonvolas skribi al ni. « Ĝis nun, ni kredas ke la ĉeesto de D^{ro} Zamenhof ĉe la kongreso povas esti esperata kiel certa ».

Ni povas aldoni la jenan avizon de nia distinginda kunlaboranto D^{ro} Hanauer :

« Doktoro Zamenhof vizitos nin antaŭ la kongreso ». Oni do devas ĝoji kun la penso ke, certe :

Doktoro Zamenhof ĉestos la Kongreson.

Okaze je la Kongreso, nia Esperantista kunfrato « Esperanto-jurnalo », kiu momente ĉesis eldoniĝi pro reorganizado, eliros ĉiudimanĉe (anstaŭ duonmonate), de la 29^a de Julio. Unu numero 10 centimoj.

Al ĉiuj novaj abonantoj antaŭ la Kongreso estos donacata unu *Insigno-Stelolai* la modelo nun ĝenerale vendata 1 frankon. (Precizigi ĉu oni deziras broĉon aŭ kravatpinglon. Rekomendita poŝto : 25 centimoj). Vidu anoncon.

La reapero de tiu grava organo, plioftigita, estas serioza antaŭenpaŝo por nia afero.

Ni anoncis la aperon de « Eho Esperantista » monata aldonio de l' « Eho » (Eho) Berlino.

La 1^a N^o ĵus eliris. Ĝi enhavas ĉiaman rubrikon : konataj Esperantistoj ; prozaĵojn ; vortaron ordigitan laŭ la seneco ; praktikajn sciigojn ; korespondado, esp. hoteloj ; modeloj de komercaj leteroj, k. t. p.

Estas tre dezirinda, ke tiu aldonio de l' tutmonde legata « Eho » havu sukceson kaj fruktodonan influon por la disvastiĝo ĉe la germanlingvanoj.

En « Unua Paŝo », kelkaj prvaj rimarkoj pri la Esperantistaj verkistoj kaj bibliografiistoj. Efektive tiuj lastaj estas iafaje tro emaj diri « ni rekomendas tiun ĉi verkon al nia legataro ». Sed, ilia senkulpigo estas ke, kiam, okaze, iu el ili permesas al si kritikojn, ofte li ricevas severan kontraŭkritikon de l' kritikito ! pruvanta ke tiu lasta estis prava, kaj la diskuto ne plu finas, pleninganta la revuon. Malgraŭ tiu bedaŭreblaĵo, saĝnas efektive ke pli severa aŭrezonita kritiko estus dezirinda.

Pri « Unua Paŝo », ni rimarkigu, pasante, kiel tiu revuo, tute Esperanta, ĝuste komprenis sian rolon : konatigi Bulgariojn : landon, kutimojn, legendojn, literaturon.

Pri utiligo de ĉiuspecaj naciaj riĉaĵoj, ĝi estas modelo sekvida por similaj revuoj « landaj ».

Ni dankis en nia lasta numero la afablajn kunfratojn, kiuj tiel frate helpis kaj faciligis niajn unuajn infanajn paŝojn.

Estu al mi permesite aldoni specialan dankon al l' afabla redaktoro de « La Esperanta Studento » kiu, vere, trogandigas la atenton kaj helpon de ni donitajn al tiu bonega revueto.

Efektive, mi parolis la unua pri ĝi. La kaŭzo estas simpla. Mi mem, en Alĝerio, kiel propagandisto iafaje provis presi broŝuretojn aŭ cirkulerojn skribmaŝino kaj kopimaŝino, kaj neniel sukcesis fari ion... legeblan, malgraŭ granda elspezo de peno kaj tempo.

Mi do miris vidante la admirindan legeblecon de « Esperanta Studento » kiu ebligis al mi vidi ke la legeblaĵoj estas tute legindaj, interesplenaj kaj spritaj.

La desegnaĵoj plumfaritaj estas ĉiam amuzigaj, kaj mi rekomendas al vi tiujn montrantajn la redaktoron, armitan per pluvombrelo kontraŭ ĉiuspecaj leteroj, aŭ per fera armilaro kontraŭ... ĉio, t. e. riproĉoj de aŭtoroj ne vidintaj presitaj siajn verkojn, de abonintoj ne ricevintaj ĝustatempe sian revuon, de severa leganto, feliĉa rimarkigi *unu* eraron el miloj da vortoj !

Pri la eraroj, cetere, oni ĉiam konsentas kaj, kiel ni jam diris, ekzistas en tiu revuo, speciale dediĉita al la lernantoj,

aparta fako por la korektado de manuskriptoj. Tiu dediĉo ne malhelpas la revuon esti interesa por la nekomencantoj : nun estas en presado traduko de l' « Fratoj de Mowgli » el la fama libro de l' Junglo, de Rudyard Kipling, la ŝatata angla verkisto, tradukita kun lia permeso de F^{ino} C. W. Oxenford, la redaktoro, kies talenton kaj spriton konas niaj legantoj.

Plumerare, ni aljuĝis al « Die Zeit », el Vieno, la rimarkindan artikolon de B^{ino} von Suttner, tiel lerte tradukitan de D^{ro} Hanauer. Ĝi eliris en « Die Frankfurter Zeitung » al kiu ni redonas tion, kio al ĝi apartenas.

Plezure ni legis en « Germana Esperantisto » ke la germana gazeto « Leipziger Neueste Nachrichten » atentigis sian legataron pri « Tra la Mondo. »

Esperantistaj festoj.

La sukceso de l' 2 artistaj kaj literaturaj vesperfestoj organizitaj de l' « Centra Oficejo » en Parizo, kiel propaganda rimedo por la Kongreso, instigis grupon de parizaj Esperantistoj daŭrigi tiujn efikajn kunsidojn. La 3^a okazis la 25^a de Junio.

La « najlo » (franca esprimo = ĉefa rimarkindaĵo) de l' programo estis triaktora komedio « La letero de rekomendo » tradukita de S^o G. Warnier, el la « C.O. », ludata de D^{ro} Leon Zamenhof, frato de nia

majstro (Polo), Pro D^{ro} Carlo Bourlet (Franco) kaj S^o Pujula y Valès (Katalano).

Tiu vesperkunveno okazis en la salonoj de l' « Société française de Photographie », gajnita al Esperanto de ĝia prezidanto Generalo Šebert, kaj en kies belega hotelo sidas la Centra Oficejo.

La 1^a de Julio okazis festo organizita de la esperantistaj grupoj de Parizo kaj Fontainebleau.

La unua, kiu ĉiam finas la studadan periodon per kampara festo, havis la bonegan ideon kunigi kun najbara grupo en la belega arbaro, fama en la tuta mondo pro la mikso de ĝiaj krutaj kaj grandegaj ŝtonegoj kun multcentjaraj arboj. La festo mirinde sukcesis.

La 10^a de Junio, simila festo kunigis en Nolay la grupojn de Beaune, Le Creusot, Mâcon, Chalon. Pri tiu festo, des pli gajaj, raportas sprite redaktoro de l' « Journal de Beaune », kiu konfesas ke li estis tute esperantistigita post tiu ĉarma festo.

Okazis ankaŭ bela festo en Bulonjo-sur-Mar, je l' honoro de D^{ro} Zameuhof, kun franca kaj Esperanta programo.

Estas dezirinde ke ili multobliĝu ĉar, elirante el tiaj konvinkantaj kunvenoj, la skeptikulo sincera estas devigata diri kiel Cesar', kun iom da ŝanĝo « Mi venis, vidis... kaj estas venkita. »


Fine, en Londono. La afabla keĵkonata Sekino, F^{ino} Lawrence, afable sendis fotografon, kiun ni ne povis enpresi, pro manko de spaco.

Ni donas fine fotografan raporton pri kunveno okazinta en Brunn' (Moravlando) por danki nian amikon, Pro^o Otto Simon, kiu helpis antaŭenpuŝi nian aferon en tiun landon, iom dormintan post la malapero de la boheme-esperante redaktita gazeto « Český Esperantisto », kaj ekvekiĝintan dank' al la penadoj de sindonaj propagandistoj, inter kiuj S^o Karlo Steier.

La fotografo montras lin, ĉe la unua vico, tenantan en la manoj propagandan afiŝon. Kiel oni vidas, ĉe li « la valoro ne atendis la nombron de l' jaroj ».

Li sukcese gvidis, tiun ĉi jaron, du kursojn vizititajn de multaj kaj eminentaj personoj de Brunn', el kiuj kelkaj iĝis komitatanoj : ekz. D^{ro} Halschek, financa ĉefkonsilisto kaj D^{ro} Zatschek, ĉefprokuroro.

El leteroj de Soj J. Weber kaj Karlo Steier.



ESPERANTISTA FESTO EN BRUNN'

Esperanto en U. Ŝ. de A.

Ni plenigas nian lastan artikolon pri Esperanto en U. Ŝ. de Am. per la nomaro de l' Komitato de l' « American Esperanto Association ».

Hon. Prez.: D^{ro} Zamenhof; Hon. Vic-Prez.: Prof. W. M. Ostwald, Leipzig.

Prez.: R. H. Geogheghan, Esq., Seattle, Wash; Vic-Prez.: D^{ro} H. W. Morse, Harvard Univ; Prof. A. M. Grillon, Phila.; D^{ro} Max Talmey, New-York City; Francis G. Morin, Chicago.

Sek.: J. F. Twombly, Brookline, Mass; Kas.: S. W. Travis, J. R., Brooklyn, N. Y.

Kiel oni vidas, niaj transoceanaj samideanoj forgesis nek la fruktodonan agadon de l' eminenta scienculo, Prof. Ostwald, dum kiam li faris paroladojn sciencajn ĉe la Harvard'a Universitato, kie li multe propagandis Esperanton; nek la senĉesan agadon de S^o R. H. Geogheghan, unu el la tute unuaj Esperantistoj en Ameriko, aŭtoro de tre konata kaj malnova lernolibro anglalingva « Grammar and Exercises ».

Jen estas kelkaj novaj sciigoj afable senditaj de l' sek. de « A. E. A. ». Ni enpresas ilin, ĉar ili rilatas gravan movadon en la universitata mezo.

Lastaj sciigoj pri Esperanto en la U. Ŝ. de Am.

La Philadelphia Esp. Societo multe prosperas: ĝi komencis sian ekzistadon per 60 anoj fondintoj. La honora prezidanto de ĝi kaj la varbiginto de tri cent Esperantistoj, S-ro A. M. Grillon, vizitos Eŭropon tiun ĉi someron.

Ankaŭ S-ro Lewis B. Lueders (prez. de la Philadelphia Esp. Soc.) vizitos la Genevan Kongreson.

La Harvarda Esperantista Klubo ankaŭ prosperadas. La Harvarda Universitato, en Cambridge, Mass., estas la plej malnova (fondita en 1636), la plej granda (5000 stud.), kaj la plej fama Universitato de la Nova Mondo. Profesoro de Matematiko, Edward Huntington, de tiu Universitato, tradukigas unu el siaj matematikaj verkoj el anglo en Esperanton.

Profesoro G. B. Viles (Germana Fako, Ŝtata Universitato de Ohio, Columbus, Ohio) varmege propagandas Esperanton en sia Universitato. Antaŭ kelkaj semajnoj li skribis por loka ĵurnala artikolon je kvar kolonoj: li faradas ankaŭ kursojn Esperantajn por studentoj de la Universitato.

Ĉe la Somera Lernejo (someraj kursoj) de la Universitato de Suda Kalifornio, Los Angeles, Kalifornio, oni faros Esperantajn kursojn.

La « Christian Endeavor World », ĵurnalo de la Societo « Christian Endeavor », nun enhavas ĉiusemajne simplajn lecionojn pri « nia lingvo ».

Dum la du lastaj monatoj la sekretarioj de la malmultaj societoj Esperantistaj en nia lando ricevis 2000 (du mil) leterojn pentantajn informojn pri Esperanto.

La « afero » efektive komencas vivi en la U. Ŝ.

Kore la via, J. F. TWOMBLY.

Ni aldonu, ke pamfletoj kaj artikoloj pri kaj por Esperanto multobliĝas en U. Ŝ. A.

Ni citu, aparte, tiun de D^{ro} H. W. Morse, en la « Harvard Illustrated magazine (I — 1906) kaj tiun de P^{ro} Albert Schinz of Bryn Man College, en la Januara n^o de « The Atlantic monthly », ambaŭ bonegaj kaj miksitaj je Esperanto.

La dua finiĝas per tiu kurioza kaj diskoninda rakonto, farita de la aŭtoro: « Aŭdinte pri Esperanto, li decidis skribi al S^o de Beaufront. Baldaŭ li ricevis libreton: Lingvo Internacia Esperanto, kaj ian Dimanĉon (kiel amuzo, ne por labori), ĉirkaŭ la tria horo, li komencis lerni. Je la kvara, li povis legi sen malfacileco. Post la vespermanĝo, li skribis al S^o de Beaufront dankleteron en Esperanto. Li estas certa ke iu ajn povas tiel bone fari. Eble pli bone. »

Ĉiaflanke, la « A. E. A. » dissemas multajn propagandilojn kaj ĝi intencas eldoni, en Oktobro 1906, Amerikan Esperantan ĵurnalon.

Goje ni de nun salutas tiun novan kunfraton.

Pri l' « Albumo de Konataj Esperantistoj ».

Okazis la neevitebla: forgeso de l' portretoj de kelkaj famaj samideanoj. Ni ne volas citi tiujn, pri kiuj oni skribis al ni, ĉar, niaflanke, oni povus senkulpigi nin je forgeso.

Sommerrestadoj.

S^{ro} Pro Ch. Lambert, el la Diĵona Universitato, pasigos la tutan aŭgustan monaton en Pension Bel-Air en Bönigen, apud Interlaken (Bern) Svisujo.

S^{ro} Dro Fromageot kaj lia familio pasigos la finon de Aŭgusto en Hotelo de l' Espérance en Marécottes apud Salvan (Valais) Svisujo.

Vidu la lastan numeron (Sama Rubriko).

Tamen estas 2 nomoj por kiuj ni faros escepton: S^o S^o Martin, kies aktivan agadon en Kanadlando ni citis plezure en nia raporto pri la Bulonja Kongreso, kaj pri kiu S^o Berthelot skribis al ni leteron tre amikan por li; kaj la aŭtoro mem de la albumo, S^o Schuck, kiu domaĝe, kiel rimarkigis nia kunfrato « Germana Esperantisto », tute modeste laŝis forgesi sian kunlaboradon, jam gravan, en la esperantista movado en Germanujo.

Tiuj forgesoj pravigas tion, kion ni jam diris. Oni rapidu elĉerpi la unuan eldonon de l'albumo por ebligi, ĉu duan pliampleksigitan, ĉu eldonon de dua albumo, dank' al la senĉesaj laboroj de novaj batalantoj, iĝantaj famaj sciavice.

(2 fr. 40 afr. ĉe ni).

Bibliografio. — Novaj verkoj.

« Don Juan aŭ la Ŝtona festeno » kvinakta komedio de Molière, tradukita de E. Boirac, la eminenta Rektoro de la Diĵona Universitato.

« Pola Antologio » de nia konata kunlaboranto Kabe, aŭtoro de « La Interrompita kanto ». Ambaŭ ĉe Hachette & Cie, Paris, kiu ankaŭ eldonis la rimarkindan verkon: kvarlingva « Anatomia vortaro », preparolitan en nia lasta n^o.

« Julio Cezaro », kvinakta tragedio de W. Shakespeare, trad. de D. H. Lambert, B. A. (Oxon). (Eldono de Brita Esperanta Asocio).

« Kio povas okazi se oni donacas surprize », de Fritz Reuter, tradukita de S^{ro} Ĉefeĉ, kun 16 originalaj ilustraĵoj (0 fr. 80 ĉe ni).

« La Fundamentoj de l' Pacifismo » de Elie Ducommun, trad. de Victor Dufrenoy, eldono de la societo « Pacifisto » (0 fr. 70, af. ĉe ni).

« Nova gvidlibreto por soldatoj en ĉiuj landoj » kolekto « Paco-Libereco », 45, R. de Saintonge, Paris (10 c.)

« Memento de la grammaire Espérantiste » de C. Dieterlen, ĉe P. E. S. (10 c.)

Ni raportos pli detale pri la ĉefaj el tiuj verkoj, kiam ni havos spacon.

Detalaj raportoj estas fareblaj nur, kiam ni ricevis 2 ekzemplerojn de l' verkoj.

KOMERCO — GRAVA!!

Ni ricevas, subskribitan de S^{oj} Carl Feyerabend, Prez^{to}, kaj Carl Barthel, l^a sek. de « Progreso », pri kiu ni tre atentigas nian legantaron.

« La Progreso », internacia Komercista Esperanta Societo, sidejo Frankfurt a. M., neue Mainzerstr. 59, progresadas: Ĉe sia fondo, antaŭ kelkaj semajnoj, ĝi havis ĉirkaŭ 100 membrojn, nun ĉirkaŭ 200, inter ili 8 firmoj. Ĝi sukcesis gajni por siaj celadoj la « Kaufmännischer Verein » kiu havas 17,000 membrojn kaj kiu publikigis en sia organo: « Kaufmännische Zeitung », laŭvorte, la tutan paroladon, kiun S^{ro} Feyerabend faris ĉe la fondo de la societo. Plue, ĝi donis al la juna societo, senpage, instruojn por esperanta instruo. Ankaŭ urban lernejon la societo obtenis, por lernigi en tio Esperanton. Devas esti speciale akcentata, ke la « Progreso » tute ne volas konkuri je la Esperantistaj Grupoj: tri estraranoj de la Esperantista Grupo Frankfurt a. M., inter ili la prezidanto, Sinjoro Küchler mem, estas ankaŭ en la estraro de la « Progreso ». En urboj en kiuj jam ekzistas Esperantistaj Grupoj, la « Progreso » rekomendas al siaj membroj uzi la lernkursojn de tiuj, ĉar ĝia ĉefega celado estas provizore: *la propagando de Esperanto nur inter la komercistaro*; kaj en tiu maniero, ĝi multe povas helpi la agadon de la Esperantistaj Grupoj, kiuj hodiaŭ havas la malfacilan taskon de la propagando de Esperanto inter la plej diversaj homaj klasoj kaj profesioj. Kiu estas la homo, kiu la plej ofte devas interkomunikiĝi kun la reprezentantoj de la plej diversaj nacioj? La komercisto! Li do unue ekkonos la gravegecon de nia ideo; kaj, post la praktika konsidero de la moderna komercisto, tre rapide malaperos la antaŭjuĝoj kiujn ofte, tre ofte ankoraŭ, renkontas la ĝenerala propagando de nia afero inter la diversegaj profesioj.

Antaŭen do! La celo estas klara antaŭ niaj okuloj, ni streĉu ĉiujn fortojn por ĝin atingi! »

STELETO.

Fotografajoj.

Petu en ĉiuj magazenoj de Genevo kaj de Svisujo la artplean poŝtkartojn (Svisajn vidaĵojn).
Eldono Charnaux fratoj kaj K^{io}, en Genevo.



Milito kaj Paco.

Graveco de l' Esperanta lernado por la militistoj.

Nun, en ĉiuj landoj, la oficiroj avidas instrui sin, lege, pri la progresoj de l'armado kaj de la taktiko de l' fremdaj armeoj; kaj oni instigas ilin vojaĝi fremdlanden por konatiĝi, okule, kun tiuj ĉi armeoj kaj ilia organizado.

Pli kaj pli naskiĝas okazoj, en kiuj oficiroj de diversaj nacioj estas nedaŭre kunigitaj; ĉu malgrandanombre, kiel ĉe la multaj komisionoj starigantaj limojn por diskutataj teritorioj en la kolonioj, aŭ kiel la militaj delegitoj kiel rigardantoj — apud la malamikaj Staboj dum granda milito, ekzemple la rusa-japana; ĉu grandanombre kiel en Kreto aŭ en Ĥinuĵo, kie ili ludas aktivan rolon.

Estas evidente ke la neceseco elekti, se eble, en tiaj cirkonstancoj, oficirojn konantajn la diversajn fremdajn lingvojn, plimalgrandigas la nombron de tiuj elekteblaj, kaj devigas, iafafoje, forigi la plej taŭgajn, teknike. Kaj en la plimulto el la okazoj, ĉar nenia oficiro povas koni ĉiujn necesajn lingvojn, la militaj reprezentantoj de l' diversaj nacioj ne povas ĉiam plenumi kontentige sian mision, ĉar ili ne ĉiuj interkomprenas reciproke!

En tiaj cirkonstancoj, do, Esperanto ludus tute utilan rolon. Jen estas, cetere, leterojn pravigantajn tute tiun opinion, kiu rilatas ankaŭ simplajn soldatojn aŭ suboficirojn.

La unua estas atesto donita, post la Ĥina militiro, de Generalo Bailloud, kiu ludis gravan rolon dum tiu ĉi militiro.

« Dum la Ĥina internacia militiro, mi iam komandis miksan kolonon enhavantan kontingentojn francajn, anglajn, germanajn, italajn. Mi do povis konstati, eksperimente, kiom komuna lingvo, kiun ili estus povintaj lerni dum la vojaĝa tempo, de l' devena lando ĝis la alvena loko, estus utilinta al ĉiuj.

« Oni ne tro sciis gratuli Kapitanon Capé pro lia laŭdinda iniciativo, kaj konvenas faciligi lian taskon per ĉiuj rimedoj uzeblaj. »

Subskribita: GENERALO BAILLOUD.

Leŭtenanto-Kolonelo Ballandier, kiu komandis unu batalionon de l' 1^a Zuav'-Regimento, ne estas malpli konvinkita pri la utileco de Esperanto.

Jen estas eliraĵo de tre plena letero, kiun li bonvolis skribi al Kapitano Capé.

Mia kara kamarado,

« Mi tute konsentas pri via opinio rilate la kreadon de internacia lingvo, facile komprenebla kaj ellernebla, kiu farus grandajn servojn en cirkonstancoj similaj al tiuj de la Ĥina militiro, aŭ por la komercistaro.

« Dum la Ĥina militiro, la bataliono de l' 1^a Zuav'-Regto, konstante kontaktiĝis kun soldataroj ĉiunaciaj.

« Per la franca, germana kaj angla lingvoj, mi fine, evidente, interkompreniĝis, kondiĉe ke ĉeestis ĉiunaciaj oficiroj parolantaj unu el tiuj lingvoj, tio kio ne ĉiam okazis.

« Okazis ke, kelkafafoje, neniŭ ĉeestanta oficiro konis la saman komunan lingvon: vi povas kredi ke tio ne estis plezuriga.

« Kelkajn tagojn post nia elŝipiĝo, la rusa generalo, kiu komandis ĉe San-Haj-Kuan, petas de mi la kunhelpon de du kompanioj por partopreni en kolono, kiu estis agonta al Jan-Ping-Fu. Malfrue mi ricevis tiun peton, tiamaniere ke miaj kompanioj alvenis fervoje en Lang-Ĉeu, kiam la aliaj anaroj jam estis ekmarŝintaj. Ĉe la stacidomo estis rusa

oficiro komprenanta nek la germanan lingvon, nek la anglan, nek la francan. Niaflanke—du hindakavaleriaj skadroj estis elveturigitaj kun ni—neniu konis la rusan; mi ne povis scii, kien ni devis iri: ni ne estis bonhumoraj kaj protestegis forte kontraŭ la Stabo de l' rusa generalo, kiu nin tiel forlasis! Fine kun grandaj gestoj, signoj kaj krioj, rusa oficiro kun kelkaj soldatoj antaŭe lokiĝis, kaj iĝis nia gvidisto. Estas tute evidente ke, se Esperanto estus estinta uzata, ni estus povintaj deiri tuj post nia alveno kaj scii ĝuste tion, kion ni havis por fari.

Subskribita: L^{to} KOLONELO BALLANDIER.

Fine mi ĉerpos el unu el la du artikoloj verkitaj de S^o Cart, por la ĵurnalo « La France militaire », pri kiuj oni parolis en la 10^a N^o de tiu revuo, la sekvantan rakonton, kiu elokvente montras la necescon de komuna lingvo dum militoj kunigitaj, en la samaj rangoj, diversnaciajn armeojn.

« Je tiu ĉi momento amerika oficiro, malbone kompreninta parolan raporton, al li transdiritan de franca oficiro je l' nomo de japana generalo, kredis la batalon finita kaj laŭte raportis al sia generalo. La Amerikanoj tuj antaŭeniris neŝirmante sin, orienten de l' urbo kaj suferis gravajn perdojn. »

Similaj faktoj povus okazi dum milito en kiu partoprenus la aŭstra-hungara-bohema-morava armeo.

Por la kontraŭmilitantoj, ankaŭ, la kono de Esperanto ne estus malpli utila:

La antaŭaj postenoj, la senditoj por akordiĝi, la militkaptitoj, la parlamentantoj, la intendantoj, kaj la ĉiuspeca provizado estas tion da okazoj, kie Esperanto estus uzebla.

Fine, en la zorgado pri vunditoj ĝi havus nediskuteblan utilecon por la militaj kaj civilaj medicinaj, la anoj de la Societo de l' Ruĝa Kruco kaj la vunditoj mem.

Pri tiu temo leŭtenanto Bayol verkis broŝuron, kies baldaŭa eldono havos certe grandan efikon por la disko de nia afero, ĉar ĝi atentigos pri ĝi la multajn personojn okupigantajn je tiu nobla tasko: la zorgado de l' vunditoj dum la milito.

Je tiu ĉi, pure milita, vidpunkto, la soldatoj kiel la oficiroj devus lerni Esperanton. Sed, plilarĝigante la demandon, je l' civila vidpunkto ankaŭ ili devus ĝin lerni:

Nun, krom maloftaj esceptoj, oni ne plu estas longedaŭra militisto; en iaj landoj, aparte en Francujo, oni penadas utiligi la militservon por plenigi la ĝeneralan instruitecon de l' soldatoj, ilin armante por la paĉa « batalado por la vivo ».

La lernado de Esperanto, je tiu vidpunkto ankaŭ, estas do tute dezirinda kaj, kiel mi ĝin diris en mia lasta artikolo, estus tre bone ke, en ĉiuj landoj, la propagando en la armeo estu pli kaj pli disvatigata, kiel ĝi jam en Francujo disvastiĝis efike, dank'al la oficiala ministra aprobo.

Sajnas do ke, dum la Geneva Kongreso, tiu tiel grava punkto estus konsiderinda. Krom la utileco celita, tiu propagando en la kazernoj estus fonto por propagando ekster ili: inteligentaj suboficiroj kaj soldatoj, allogitaj de tio, kion ili estus lernintaj, iĝus post sia reiro en la civilan vivon, tiom da semantoj de la ideo. Kaj ni scias, kiom unu sola decida homo povas utili nian aferon!

Kiel eble plej rapide, do, militaj kursoj devas esti plimultigitaj. Ĉiuj bonvoloj penadu al tiu celo.

OFICIRO.

Honora Legio.

Plezure ni sciigas ke nia amiko Kapitano Capé, kiu atingis la oficialan enkondukon de Esperanto en la Armeon, estas ordenita kavaliro en la Honora Legio la 14^{an} de Julio.

Ni varbu la maristojn.


Tre utila estos la Esperanta movado ĉe la maristoj, kiun S^{ro} Duchochois tiel bone iniciatis: Tiam kiam ni teranoj, estas kvazaŭ najlataj sur nia lando, la maristoj, vizitante multajn havenojn povas konigi palpe al ĉiuj fremduloj la tutmondajn progresojn de nia lingvo.

Por helpi tiun movadon mi proponas, ke aparta komisiitaro en la Geneva Kongreso sin okupu je la rimedoj por organizi ĉe la maristoj internacian propagandon.

Tiucele ĉiuj personoj interesiĝantaj je la maraĵoj skribu al mi la rimedojn, kiujn ili juĝas plej efikaj. Mi faros raporton pri ili kaj ĝin alportos al la supredirita komisiitaro. En la sama celo, ne forgesante ke la aŭtoritatargumento estas tre grava por nia afero, ĉiuj devas, tuj de nun, serĉi maristojn, ĉu komercajn, ĉu militajn, kiuj akceptos ke lia nomo estos subskribata sub cirkulero internacia sendota al la ĉefaj militŝipoj kaj kuriersĝipoj. Tiuj nomoj estos kolektataj dum la kongreso kaj la cirkulero redaktata.

RENÉ MESNY.

profesoro de hidrografiaĵo, eksmaroficiro,
5, Rampe, Brest, Francujo.



ORNAMO POR « LA VESTA' ULINO », DE JAMBON', LA FAMA ORNAMPENTRISTO.

La Vesta' ulino.

Triakta tragedio de JOUY. — Muziko de SPONTINI.

La 26^{an} kaj 28^{an} de Aŭgusto estos prezentata en niaj arenoj la teatraĵo «La Vesta' ulino», kies sceno havas sian lokon en Romo. La kolosa ornamo de Jambon' pligrandigos ĝian nediskuteblan belecon. Maldekstre estas l' *Atriumo* (aparta loĝejo de l' Vesta' ulinoj), la *palaco de Numa'* kaj parto de l' *sankta Arbaro*; malantaŭe, *Monto Palatin'*; dekstre, la *remparoj de Romo*.

1^a akto. — Apenaŭ tagiĝas kiam Cinna', ĉefo de Legio, trovas la roman generalon Lucinius' meditantan, apogiĝintan sur unu el la kolonoj de l' Atriumo, kaj kiam la generalo konfesas al li sian amon por Vesta' ulino Julia. Cinna kompatas lin; ĉar tia amo estas malpermesita.

La Vesta' ulinoj iras al la templo kantante la *Himnon de l' Mateno* dum la grandVesta' ulino ekscitas la kuraĝon de Julia' per la elmonro de la honoroj, kiujn ricevas la pastrinoj de Vesta', kaj per timiga pentraĵo de l' Amo. Malgraŭ la petegoj de Julia' premegata de doloro, la grandVesta' ulino postulas, ke ŝi daŭrigu l' eternan fajron, kaj ankaŭ ke ŝi kronu la venkinton.

Impona sekvantaro antaŭeniras. La konsuloj kaj la senatanoj kondukas la heroon sub venksignon.

Pasiginte la oran kronon sur la sankta fajro, Julia' kantante ĝin metas sur la kapon de Lucinius', kiu estas surgenue antaŭ ŝi, kaj antaŭsciigas ŝin, ke tuj kiam noktiĝos, li ŝin forrabos.

Ludoj, dancoj, vetbataloj okazas por la honoro de l' triumfo de generalo Lucinius'.

2^a akto. — Havante en la mano la oran vergeton uzatan por daŭrigi la fajron, Julia' supreniras al la altaro, pensante pri sia amato, kiu baldaŭ venos. Tuj li aperas, kaj juras ami kaj defendi ŝin. Sed la fajro subite estingiĝas, kaj la du geamantoj estas

superplenigitaj je teruro. Julia' longe petegas Lucinius'on ke li deiru. Li decidiĝas foriri por penadi savi ŝin.

La pastroj kaj la Vesta' ulinoj eniras dum la popolo alvokas la venĝon. Vidante la fajron estingiĝintan, la ĉefpastro indignas. Depreninte la ornamojn de la kondamnitino, oni jetas nigran vualon sur ŝian kapon, kaj soldatoj dekondukas ŝin.

3^a akto. — Lucinius' nedireble malĝojega rigardas la tombon, kiu tuj ricevos Julia'n vivan. Per petegoj kaj minacoj, li volas ricevi ŝian pardonon. La ĉefpastro ordonas, ke oni alpendigu ŝian vualon al la ataro, kaj se ĝi brulos, tio estos pruvo, ke diino Vesta pardonas. Sed la ĉielo ne plenumas la preĝojn de l' Vesta' ulinoj. Lucinius' intencante sinmortigi apogas glavon al sia brusto. Por lin savi, Julia' diras, ke ŝi ne konas lin. La pastroj ordonas, ke ili mortu kune.

Julia' malsupreniras en la subteran galerion. La soldatoj de Lucinius' kaj la soldatoj de l' pastroj ekbatalas; sed tuj tondradas, la scenejo estas lumigata de fulmoj. Kaj kiam Lucinius' kaj Cinna' malsupreniras en la tombon, tiam la fulmo ekflamiĝas la altaron kaj la vualon de Julia'. Tiu ĉi miraklo savas la vivon de la Vesta' ulino. Lucinius' kaj Cinna' suprenportas ŝin duonsenvivan. Iom post iom, ŝi rekonsciiĝas. Oni kondukas la geamantojn al la altaro. Ilia edziĝo estas festata de ludoj kaj dancoj.

Espereble, la ministro de l' Publika Instruado kaj S^{ro} Sarraut, subsekretario de Ŝtato ĉeestos ĉe tiuj prezentadoj, kiuj certe altiros multe da vizitantoj.

JOHANINO FLOURENS.

Beziers'o la 28^{an} de Junio 1906.



LA ROCHELLE. — LA MALNOVA HAVENO KIAM LA PURIGA KLUZO ESTAS MALFERMITA.

Kl. Ch. B.

La Rochelle

Originalo de SAM. MEYER (Francujo).

La antikvaj turoj de La Rochelle estas tre konataj. Ĝus oni decidis ripari la « Lanterna Turo » 'n, jam klasigitan kiel historia monumento. Estas tie okazo por paroli pri la malnova urbo, kiu estis scenejo por multaj famaj militagoj. Tion bonvolis fari nia lerta samideano Sam. Meyer, loĝanta en la urbo.

La Rochelle estas urbo tre malnova.

Por konvinkiĝi pri tio ĉi, sufiĉas ekrigardi ĝiajn antikvajn turojn, ĝiajn arkadojn kaj la malnovajn domojn, kiuj vidiĝas ankoraŭ en kelkaj stratoj.

Koncerne ĝian ĝustan aĝon, malpli facile estas ĝin scii.

Sajnas ke La Rochelle estis en la komenco simpla ardo da dometo konstruitaj de kelkaj malriĉaj fiŝkaptistoj. Pro tio ĝi ne estis rimarkita de la malnovaj historikskribistoj.

Por sia loĝado tiuj fiŝistoj devis elekti naturan golfeton, kie iliaj barkoj povos rifuĝi dum la ventegoj. Ilia rifuĝejo ne estis ĝuste en la loko, kie la nuna haveno kuŝas: la malnova haveno konsistis en simpla kanalo, kies eniro estis proksime de la nuna « Lanterna » turo, kaj kiu sekvis proksimume la direkton de la nuna defluilo laŭlonge de la remparo ĝis la granda placo (Place d'Armes).

La unuaj domoj konstruiĝis sur la mallarĝa peco de tero ĉirkaŭ tiu natura haveno. Kredeble tiu peco de tero, formita el ŝtonega altaĵo, estis unue nomita *Rochelle*, t. e. malgranda ŝtonego, kaj tiu nomo estis poste donata al la naskiĝanta urbeto.

Iom post iom la malnova haveno pleniĝis per la sablo kaj la ŝtonetoj enŝovitaj de la ĉiutagaj alfluo de la maro; oni do devis forlasi ĝin kaj ekuzi la nunan havenon.

Ankaŭ tiu ĉi en la komenco estis nur malgranda golfeto kavigita de la maro. Pligrandiĝante, la urbeto sin etendis sur tiu flanko.

La ĉefa urbo de la regiono estis tiam *Chatel-Aillon*, granda kaj fortika urbo, ĉirkaŭita de remparoj kun turoj kaj profundaj enfosajoj. Ĝi estis sinjorlando dependanta senpere de la Reĝo.

En la komenco de la dekdua centjaro, *Guillaume* deka, duko de *Aquitaine* kaj grafo de *Poitou*, atakis *Isambert* 'on, sinjoron de *Chatel-Aillon* kaj, venkinte lin, duone detruis lian urbon. La ondoj maraj, senĉese mordetante la bordon, iom post iom pleniĝis ĝian ruiniĝon, kiel ili ankaŭ estis ruiniĝintaj alian urbon, *Monmeillan*, kiu staris iom pli okcidente, proksime de la nuna insulo *Aix*.

Post la malapero de tiuj du urboj, iliaj loĝantoj rifuĝis en La Rochelle, kiu de tiu momento pligrandiĝis rapide.

Guillaume deka, post la detruo de *Chatel-Aillon*, elektis ĝin kiel ĉefurbon de *Aunis* kaj donacis al ĝiaj loĝantoj plenan liberecon.

Je la morto de *Guillaume* deka, la duklando *Aquitaine* kaj ankaŭ La Rochelle fariĝis propraĵo de lia filino *Eleonoro*, edzino de la franca reĝido. Tiu ĉi baldaŭ fariĝis reĝo sub la nomo *Ludoviko sepa* de Francujo; tiele La Rochelle estis kunigita kun la franca reĝa regno.

Tio ĉi ne daŭris longe, ĉar, en la jaro 1252, *Eleonoro*, ekcedzigitaj de *Ludoviko sepa*, reedziniĝis je *Enriko de Normandujo*, kiu fariĝis *Enriko dua* de Anglujo. Tiam La Rochelle kaj la tuta duklando *Aquitaine* transiris sub la regadon anglan.

Enriko penadis gajni la korojn de la Roŝelanoj, donacante al ili multajn privilegiojn.

En la 1224^a jaro, Ludoviko oka reprenis La Rochelle-on de la Angloj; en la 1360^a ĝi denove estis transdonata al Anglujo per la traktato de *Bretigny*, kaj ree fariĝis franca post 12 jaroj.

Malgraŭ tiuj multaj ŝanĝoj de posedantoj, La Rochelle prosperis kaj kreskis komerce kaj militite. Malmulte ŝanĝiĝis ĝia interna vivo.

La urbo estis regata de cent «pairs». Kiam oni devis elekti urbestron, tiuj cent *pairs* proponis tri eminentajn burĝojn, kaj el tiuj tri la reĝo devis elekti unu. Li havis nur du tagojn kiel limtempo, kaj li devis tuj konigi sian decidon kaj la nomon de la nova urbestro: tiu ĉi estis elektita por unu jaro.

Por helpi al la urbestro en la administrado de la aferoj urbaj, 24 el la «pairs» elektiĝis ĉiujare (12 *échevins* kaj 12 konsilantoj).

De la reĝo de Francujo estis elektitaj unu delegitoj civila kaj juĝista, kiu tamen nur prezidis juĝistarojn roŝelanojn; kaj unu reganto milita, kiu nenion povis ordoni al la urba militistaro sen la konsento de la urbestro kaj *échevins*.

Pro tiaj gravaj privilegioj, La Rochelle estis kvazaŭ vera respubliko, tiel sendependa de la reĝo, kiel la grandaj duklandoj.

Antaŭ ol eniri en la urbon, la reĝo devis ĵuri, ke li respektos ĝian liberecon. Nur post tio, la urbestro transis la silkan ŝnureton streĉitan antaŭ la pordego.

La Rochelle tamen montris sin tre fidela vasalo de la reĝo de Francujo kaj lin helpis forte en liaj militoj kontraŭ la Angloj.

En la dek sesa centjaro komenciĝis la interreligiaj militoj. Fariĝinte la rifuĝejo de la protestantoj, La Rochelle suferis du gravajn sieĝojn de la reĝa soldataro.

La unua okazis en la jaro 1573.

Sur tri flankoj ŝirmate de la maro kaj de marĉoj, la urbo estis atakebla nur sur la norda flanko.

La tiama urbestro *Jacques Henri* fortikigis ĉiumaniere la urbon kaj disdonis armilojn al ĉiuj urbanoj.

Inter la sieĝatoj troviĝis eminentaj oficiroj, antaŭe fidelaj regatoj de la reĝo, sed pro sia religio devigitaj batali kontraŭ la reĝaj katolikaj militantoj. De la tuta Francujo (Paris, Orléans, Tours, Bordeaux, Castres, Nîmes, k. a.) alkuris kalvinanoj sin savintaj el la mortigado de Sankta-Bartelemio, kaj ĉiu el ili preta oferi sian vivon.

De tiu momento la Protestantoj fariĝis partio tiom politika kiom religia.


Tiu unua sieĝo malsukcesis kaj la reĝaj militantoj devis foriri post kvar monatoj, perdinte ĉirkaŭe 22.000 soldatojn, dum la sieĝatoj perdis 1.300 homojn, tio estas, ĉe ambaŭ flankoj, la duono de la militantoj.

Paco fariĝis kaj daŭris ĝis 1627, kiam *Richelieu* aperis antaŭ La Rochelle, nepre decidinte alniliti ĝin. Tion li ne faris laŭ la sama taktiko malbone sukcesinta al la unuaj sieĝantoj, kiuj estis eluzintaj siajn fortojn per ok sangaj kaj neerikaj atakegoj.

Li zorgis ĉirkaŭigi la urbon per enfosajo larga je 12 futoj, profunda je 6 futoj kaj longa je 3 mejloj. Post tiu ĉi enfosajo li konstruigis rempareton kun 17 fortikaĵoj kaj multaj redutoj, armitaj per fortaj paŝleĝoj.

Kvardek mil soldatoj, komandataj de la plej lertaj generaloj de la regno, loĝadis en tendaroj ekster tiuj konstruaĵoj kaj ricevis la ordonon neniam ekbatali, escepte se la sieĝatoj provos eliri.

Trankvila pri la tera flanko, Richelieu sin okupis je la mara: ĉar, malgraŭ la pafado de la fortikaĵoj



ĜENERALA VIDAĴO DE L' MALNOVA HAVENO.

itaj je paŝleĝoj, kaj du fortikaĵoj. Traboj kunligitaj per feraj ringoj baris tiun eniron, kaj triobla vico da militŝipoj staris tie, ĉiam pretaj por la batalo.

Tiel farinte, Richelieu pacience atendis la senduban rezultaton.

La sieĝatoj nepre izolitaj baldaŭ konsumis ĉiujn provizojn, kaj malsatado komenciĝis.

Terrraj estas la detaloj rakontitaj de la tiamaj historiskribantoj. Manginte la plej naŭzajn bestojn, praviante anstataŭigi la tritikon per pistitaj ostoj kaj ligno, la viandon per ledo kaj pergameno, la Roŝelanoj eĉ englutis ĝipson kaj ardezon pistitan. Multaj mangis kadavrojn: virino vidiĝis ian tagon manganta sian propran brakon. La ankoraŭ vivantaj, kun haŭto nigra, preskaŭ traborita de la ostoj, sentis netolereblan doloron je la plej malforta tuŝeto.

Kiam, post 14 1/2 monatoj da sieĝado, la Roŝelanoj devis kapitulaci kaj reĝo Ludoviko dek tria eniris la urbon, li ne povis deteni siajn larmojn je la vido de tiaj suferoj.

La heroo kontraŭbatalo de la sieĝatoj en tre granda parto estas merito de ilia urbestro, la brava *Jean Guillon*, kiu sin montris admirinda en ĉiuj okazoj, ĉiam bonhumora, ĉiam kvieta, preskaŭ gaja, kaj ĉiam laboranta. Tage li prezidis la konsiliojn, vizitis la malsanulojn, konsolis la mortantojn; nokte li ordonis aŭ kondukis mem patrolojn.

Kiam la kontraŭstaro fariĝis tute neebla, Jean Guillon, devigita cedi, elirigis el malliberejo sian privatan malamikon *Collin* kaj transigis al li la gardon de la urbo, en la espero ke tiu ĉi ricevos pli bonajn kondiĉojn por la kapitulaco.

La kondiĉoj tamen estis tre severaj. La Roŝelanoj konservis ja vivon kaj proprajn, sed ĉiuj privilegioj de la urbo neniiĝis kaj la remparoj detruigis. (Ili poste estis rekonstruitaj de *Vauban*).

La urbestro kaj dek el la plej eminentaj burĝoj estis ekzilitaj. Ili revenis poste kaj Jean Guillon mortis en La Rochelle, kie lia nomo ankoraŭ nun estas tre honorata. Oni montras en la urba palaco la marmoran tablon, kiun li frapis per sia ponardo, ĵurante ke li kontraŭbatalos ĝis la fino.

Post tiu kapitulaco la rolo politika de La Rochelle estis finita.

La urbo konservas vidiĝon apartan kun siaj arkadoj kaj siaj antikvaj turoj, sed ĝia loĝantaro tute aliĝis. Apenaŭ kelkaj el la nunaj familioj roŝelaj devenas de la tiamaj loĝantoj.

La ĉefaj monumentoj de La Rochelle estas la sekvantaj:

Turo *Saint Nicolas* (12^a, 14^a kaj 16^a centjaroj).

Turo de la *Chaine* (15^a centjaro).

Turo de la *Lanterne* (15^a centjaro).

Grosse Horloge (13^a, 14^a, 15, 17^a kaj 18^a centjaroj).

Urba Palaco (Hotel de Ville) (17^a centjaro).


Borso (18^a centjaro).

Preĝejo katedra (18^a centjaro).




ANTAŬA HAVENO KAJ ENIREJO DE L' EKSTERA PELVEGO.

SAM MEYER,
La Rochelle
(Francujo).



GHARDAIA : LA VENDEJO.



BENI ISGUEN.

Mzab'o — Ghardaia'.

Verkita de Leŭtenanto LESNE (Alĝerio).

Je ĉirkaŭ sep cent kilometroj sude de Alĝero estas malgranda grupo el oazoj nomata Mzab'o.

La loĝantoj estas disiĝintaj Araboj, kiuj, persekutitaj pro siaj kredoj de la aliaj mahometanoj, forkuris iam en la dezerton. Ili haltis, malproksime de la homoj, je dek tagoj da marŝado sude de Laghouat'o kaj je dekdu norde de El Golea'o, en la malĝojega valo de rivero Mzab'o (kiu vidas akvon nur ĉiujn du aŭ tri jarojn). Ili fosis tie putojn kaj sukcesis krei oazojn.

Tro densaj en tiu ĉi malgranda angulo de tero, la Mzabanoj serĉis rimedojn en la komerco, en kiu, tre inteligentaj, ili prosperis mirinde. Tial oni diras pri ili, ke ili estas la Hebreoj el la Araboj. Oni trovas ilin en ĉiuj anguloj de Alĝerio, havantajn butikon kaj riĉiĝantajn. Sed ili neniam forgesas la hejman landon. Ĉiun jaron, se ili povas, ili pilgrimas, dum la granda fasto (Ramdan'o) en Mzab'on, kie restadas la virinoj kaj la infanoj. Tiu ĉi kelkafoje tre longa disigo je iliaj virinoj ne ĵaluzigas la Mzabanojn. Se, post forestado da du aŭ tri jaroj, idoj naskiĝas ĉe ili malmulte da tempo post ilia reveno, ili diras ke Dio daŭrigis dum jaroj la gravedecon, por doni al ili la feliĉon apudesti por la naskigo. Sed ĉu ili kredas tion?

La Mzabanoj, pro sia religio, trinkas nek vinon, nek alkoholaĵon, kiel la aliaj mahometanoj, kaj plie ili ne fumas. Ili evitas ĉiujn fizikajn ekzercojn. Por fari la plej malgrandan translokiĝon, ili rajdas malfeliĉajn azenetojn. La rajdato estas tiel malgranda ke la piedoj de la rajdanto tuŝas preskaŭ la teron. Por sproni ĝin, la Mzabano uzas pintan bastonon, kiun li pikas sur la postajojn de la besto, en vundon tiamaniere ĉiam vivan.

Tiu ĉi fizika mallaboremo kaj hejmsida vivo malantaŭ magazena tablo donas al Mzabanoj specialan fizionomion. Mallongaj, dikaj, dikventraj, kun arkfleksaj kruroj, ili ŝajnas globoj.

Ili estas 40.000 en siaj sep urboj, kies kvin estas grupigitaj en rondo, kiu havas ĉirkaŭ dek kilometrojn diametre, apud la ĉefurbo Ghardaia'o (20.000 loĝantoj).

Tiuj ĉi urboj estas konstruitaj sur altaĵoj kaj ĉirkaŭigitaj per muregoj. La domoj amasiĝas tie apenaŭ disigitaj per mallargaj stratetoj, tial tiuj ĉi urboj ŝajnas abelujoj. En la plej alta punkto estas la moskeo (templo) super kiu altiĝas mallarga turo kvadrata, kiu ŝajnas alta kamentubo aŭ granda korno.

Tiuj ĉiuj « kornoj de Mzab'o » estas iomete klinataj, tial, ke « nur Dio povas konstrui vertikale » diras la Mzabanoj. Tien supren supreniras la « muezino » (pastro) por voki la kredemulojn al la preĝo, je multaj horoj de la tago, inter aliaj je la levigo kaj je la mallevigo de la suno. « Dio estas plej granda, li krias, — Dio sola estas Dio, kaj Mahometo estas la profeto de Dio, — Estas la horo de la preĝo. » Kaj la Araboj, kie ajn ili estas, genufleksas kontraŭ l'oriento, relevigas, terenkuŝigas, multafoje, kaj preĝas. Chateaubriand parolis pri la poezio de la sonoriloj, kiuj anoncas la tagon, la nokton, la ĝojon, la morton k. t. p. Sed ne estas malpli poeta tiu ĉi kantanta voĉo de la pastroj mahometanaj, sonanta en la dezerto.

Je kelkaj kilometroj de ĉia urbo estas oazo, beleta arbareto de palmarboj. En la ombro de tiuj ĉi arboj estas ĝardenoj, malgrandaj hordeoplantejoj kaj la kampodomoj de ĉiuj Mzabanoj, kiuj respektas sin. Tiuj ĉi kampodomoj estas nur malbelegaj dometoj faritaj el tero, kiuj havas nek fenestron, nek etaĝon, eĉ tiuj de la plej riĉaj. Ĉiujn somerajn vesperojn, je la kvina horo, kiam ili estas ŝlosintaj siajn butikojn, la Mzabanoj, rajdantaj siajn azenetojn iras en l' oazon, en siajn kampodomojn.

La oazoj ekzistas nur dank'al detaleta kaj kons-tanta surverŝado. La akvo estas ĉerpata el tre

profundaj putoj. Super tiuj ĉi putoj, inter du kolonoj rulleveno estas fiksita. Ŝnuro tre longa, kiun tiras azeneto, mulo aŭ kamelo, suprenirigas haŭton de kaproviro plenigitan je akvo. Alveninte supren, tiu ĉi sako malplenigas en pelvon. De tie la akvo deiras en multegon da malgrandaj cementaj defluiloj, kiuj portas ĝin al la piedo de ĉiu arbo, de ĉiu kreskaĵo, ĉirkaŭ ĉiu kvadrata metro da hordeoplantejo. Frumatene kaj dum longa tempo ĉiuj rullevoj turnas kriante. La kuniĝo de tiuj ĉiuj grincoj diferencaj produktas specialan muzikon ununuran en la mondo, kiu estas nomita « la kanton de Mzab'o ».

La urboj de Mzab'o, kuŝitaj sur altaĵoj, posedas nek kreskaĵojn nek akvon. Tial tie la varmece estas terura kaj la malpureco tre granda. Malgraŭ tio, dank'al la flameco de la suno, la epidemioj kaj la febroj estas maloftaj. La suno estas fajra tie ĉi, kaj la fajro purigas ĉion.

Ni pasigis en Ghardaia'o malbelegajn monatojn. Ĉiujn tagojn, dum la tuta posttagmezo, la termometro montris de 45 ĝis 53 gradoj C^{aj}. Ni restis dome de la oka horo matene ĝis la sesa vespere.

ESPERANTO KAJ JUNULARO.

Ni ricevis de S^o Romano Frenkel, Inspektoro de Gimnazio en Enisejsk (Siberujo), fotografiaĵon de alvoko al la ĝeinstruistoj esperantaj por fondo de « Tutmonda Ligo de instruistoj, por propagando de Esperanto inter gelerntoj. »

La plano estas bonega kaj tute atentinda. Al tiuj, kiuj interesiĝas al tiu grava projekto, kiun ni ne povas enpresii hodiaŭ pro manko de spaco, ni rekomendas la legadon de l' julia n^o de « La Revue de l'Esperanto », kiu enhavas la plenajn proponojn de S^o Frenkel (0 fr. 10 c., 33, Rue Wissocq, Boulogne-sur-mer, France).

Ni diru nur ke la gazeto oficiala de l' ligo estus la infana revuo « Juna Esperantisto », kiu tute pravigas, per ĝia redaktado, tiun estontan elekton. En nia proksima numero, ni enpresos kuriozan paĝon pri Esperanto kaj junularo.

En Anglujo.

La plej grava komerca lernejo el la Norda Anglujo, la « Northern Institute of Languages » decidis instrui senpage nian lingvon.

La kurso estas farata de S^o F. L. G. Maréchal B. A. Sub-Direktoro, kaj aŭtoro de la « Tutmonda lernolibro » pri kiu ni raportis.

La grupo de Leeds, kiu sciigas nin pri tio, rememorigas fiere ke la anglaj klopodoj komencis post kiam S^o Charlier, persona amiko de S^o Maréchal, klarigis al la angla pioniro S^o J. Rhodes, el Keigley, la lingvon Esperanto.

Gratulojn al la progresema Direktoro, A. C. Poiré kaj al la sindona kaj lerta profesoro.



EN MZAB'A OAZO.



MZAB'A PUTO.

surverŝi niajn littukojn kiuj bruligis nin.

Lando de la sufero kaj de la mizero, Mzab'o (kiel ankaŭ la cetero de la dezerto) estas vidinda nur pasante, kaj nur vintre. Turisto, pentristo, kiuj ne timas la ses tagojn da omnibusveturo, kiuj malproksimigas Ghardaia'on de la plej proksima stacio Berouaghia'o, kunportos de tie, post mallonga loĝado, ravegajn memoraĵojn de pejzaĝoj kaj helaĵoj nekonataj kaj mirindaj. Sed estas ĉio. Ili ne iru tien por trovi alian ion!

LEŬTENANTO LESNE

2^e Baton d'Afrique, Boghar.

Komercista junularo.

Longe raportas « The British Esperantist » pri la ekzameno pri Esperanto por junuloj, en la Londona Komerca Cambro. Tiu fakto, ke tiel grava komerca asocio kreis specialan ekzamenon pri Esperanto, kiu pagata ekzamenanto, estas tute atentinda; kaj estas dezireble ke oni ĝin diskonigu en ĉiuj naciaj gazetoj. Por tio, la legado de l' Julia numero de « T. B. E. » estas tute rekomendinda.

La ekzamenanto estis D. A. Lambert, la distinginda fratulo de la Brita Esperanta Asocio. kies novan verkon ĵus eldonis tiu agema societo; nome: « Julio Cezaro », kvinakta tragedio, de W. Shakespeare, pri kiu ni reparolos.

TUTMONDA JARLIBRO POR 1906.

La Tutmonda Jarlibro Esperantista por 1906 ĵus aperis. Ĝi enhavas pli ol 30 000 nomojn kaj adresojn de Esperantistoj kaj konsistas el 506 paĝoj dense presitaj. Ni atentigas niajn legantojn pri la granda utileco de tiu propagandilo por la lingvo Esperanto, ĉar ĝi ebligas, ke la Esperantistoj facile interkonatiĝu, kaj ankaŭ ĝi montras la potencon disvastigon de Esperanto tra la mondo. Poŝtkarto estas enmetita en la nova eldono: kaj dank'al ĉi tiu poŝtkarto oni povas sendi al la redakcio novajn aliĝojn aŭ ŝanĝojn de adreso. k. t. p. La kosto estas fr. 3,50. Sin turni al la firmo Hachette kaj K^o, 79, boulevard Saint-Germain, Paris (France) aŭ al ĝiaj riprezentantoj, ekster Francujo.






LAGO DE « BOURGET »



PRALOGNAN KAJ SUPRENOVOJO JE « LA VANOISE »

Aix-les-Bains. — Savoie.

Priskribo de D^{ro} COZE, el Aix-les-Bains.



AIX-LES-BAINS. PORDO DE L' URBA DOMO.

taj valoj de Pireneoj aŭ de Svisujo, de montoj tro altaj kaj tro proksimaj; valoj, herbejoj verdaj dum la tuta somero, similaj al la partoj la plej fruktodonaĵ de Normandujo; lago, blua Mediteraneo, kiun el ĉiuj montetoj oni vidas lumi, rideti kaj frosttremi tra la arboj; pli alte sur la monto, la soleco alpa, malvarmeta kaj saniga; sur la deklivoj, vegetado, kreskaĵaro senlime diversa, vinberejo, kiel en Italujo, ĉirkaŭprenanta la morusujon, l' erablon, festonanta la kampojn, per siaj pamproj; ĉiuj kulturoj, la greno, la maizo, la sekalo; la kverkoj, la kaŝtanujoj ombrigantaj super la herbejoj; kaj, ĉe la supraĵoj, ilin surrampanta, l' armeo severa kaj nigra de l' abioj, atakanta la grizajn ŝtonegojn; pli malproksime, fine pli alte, la vidigoj sovaĝaj, turmentitaj, altegaj; la pintoj nudaj, la glaciejoj, la neĝoj aŭ la profundegaĵoj de niaj Francaj Alpoj, tro nekonataj de ni, tro nekonataj de l' allanduloj; Alpoj de H^{te} Savoie (alta Savojo), kie reĝas la Regnestro, la Monto-Blanka; Alpoj de Savojo, de Tarentez', de Morien', de Dofine'; ĉiuj tiel belaj kaj teruraj, kiel tiuj de Svisujo aŭ

Savoie (Savojo), estas unu el la plej belaj landoj de Francujo, de Eŭropo, de la mondo. Per ĝi Francujo apudestas Italujon kaj Svisujon; kaj en ĝi, en ĝiaj pejzaĝoj tiel riĉaj, en ĝiaj vidigoj tiel diversaj, kuniĝas la tri naturoj de Francujo, de Svisujo kaj de Italujo.

Ĉirkaŭ Aix-les-Bains staras larĝaj valoj helaj, ne plimalvastigitaj, ne sufokantaj kiel multaj

Aŭstrujo; sed kiuj havas tiun ĉi ĉarmon, ke ili estas malpli vizititaj, malpli enpenetritaj de la amasoj, kaj kiuj, dank' al niaj Inicativaj Sindikatoj, kaj al la Alpina Klubo, fariĝas ĉiutage enireblaj, prezentas komfortajn hotelojn, altajn rifuĝejojn, altiras kaj mirigas la fremdulojn jam admirantajn tiujn virgajn belajojn.

Dank' al la veturiloj, la biciklo, l' aŭtomobilo, la multaj fervojoj, dank' al la kunigo tiel grava por la turisto de la fervojo kaj de la biciklo, — tiu ĉi ĉevalo, kiu po dek centimoj supreniras kun li en la vagonaron, — oni faras ekskursojn pli kaj pli longajn ĉirkaŭ Aix-les-Bains.



LANSLEBOURG KAJ LA DENTO PERRACHÉE.



CHAMBÉRY. — PREFEKTEJO KAJ ĜARDENO.



FLUMET.

Vere, ni opinias ke nenia resanigejo povas prezenti ĉe ĝi kaj ĉirkaŭ ĝi aron tiel perfektan de pejzaĝoj ĉarmaj aŭ mirindaj; ĉar, el la beleta valo d'Aix, oni povas sin transporti post kelkaj horoj al Monto-blanka, en Tarentez', Morien', Dofine, en la montaron de Grande-Chartreuse aŭ de Jura'; ĉiu el tiu montaro nesimila, havanta sian specialan vidiĝon, sian personan belecon.

Tial, ni opinias, ke Aix fariĝos pli kaj pli por la alpinistoj, biciklistoj, aŭtomobilistoj, senkonkuranta centro: pli bone kuŝita eble, ol Grenoble, Annecy (Ansi) aŭ Genevo, dank' al tiu centra situacio inter Jura'o norde, Alta-Savojo kaj Svisujo oriente, Tarentez', Morien', Dofine sude, Grande Chartreuse sudokcidente; kaj ĉar la fervojoj kiuj interligas Aix al Svisujo post du horoj, al Italujo post kvar horoj, permesas al ili penetri facile en tiujn glorajn montarojn etendiĝ-



AIX-LES-BAINS. — LA GRANDA KLUBEJO

antajn, starantajn ĉirkaŭ tiu ĉi eleganta urbo

Aix estas ĉarma kaj pura urbo, kie la fremdulo trovas ĉiujn distraĵojn eblajn en la kazinoj: « Grand Cercle », « Villa des fleurs », komforton perfektan en la hoteloj kaj grandan ĝentilecon ĉe la loĝantoj.

Sed, krom la turisto, alvenas ankaŭ la malsanulo, kiu petas de niaj Varmbanejoj, konitaj de la tuta mondo, la resanigon de siaj malsanoj, reŭmatismo, podagro, k. t. pl.; al tiu bonega klimato, kaj al tiuj belaj pejzaĝoj ĉiam verdaj la kvietecon necesan por bona bankuracado.

Verkita de
DOKTORO COZE,
en Aix-les-Bains.



PLATAĴO KAJ MONTAJ DOMETOJ DE « REVARD ».



FERVOJO AL « REVARD »

La Torento el Ŝaŭmo

Originalo de DANIEL LESUEUR (Francujo) (*).

Kiam Veroniko rekonsciigis, ŝi kuŝis sur sia lito. La kupra kampo, havanta antikvan ŝajnon, trankvile lumis. Nello sidanta, la manojn inter siaj genuoj, malgaje revadis.

— Miko, la viro kiu volis diboĉigi vin jam ne ekzistas. Se vi iam aŭskultos alian alloganton, estas vi, kiun mi mortigos. Vi estas avertita.

Ekscitita, ŝi stariĝis, volis ekscii.

Lia frato kondukis ŝin al la sama fenestro.

La monto estis kovrita de mallumo. La brilega sonĝaĉo estis malaperinta. Alikoke, elektra radio persekutis la trompistojn de l' leĝo. Sed sub la pala rebrilo de l' nuboj, oni vidis malvolvigantan la belegecon de l' ŝaŭma torento, tiu longa falo arĝentita kaj vibranta, kies perforteco skuis l'aeron per unu-tona bruego.

— Li ne reaparis.... Lian morton la Torento prenis sur sin, diris Matteo per mallaita voĉo.

La festo de l' korboj kiu fariĝas la edziĝa festo.

Post unu monato, okazis en Bellagio la « Festo de l' Korboj » havanta poezion samtempe katolikan kaj idolaman. La praktikuloj estis venintaj de ĉiuj najbaraj vilaĝoj. Unue, estis la procesio Sankta Virgulino kun vizaĝo el vakso, brila diademo, vestita de ŝtofoj ornamitaj de brilaj steloj, ĉirkaŭita de l' pastraro, antaŭirita de ĥora societo mirige maskevestita — broditaj irakoj, dukornaj ĉapeloj kun plumoj — promenigadis tra la pias stratetoj kaj antaŭ la luksa ironio de l' egantaj hoteloj, sian simplaminan misteron. Ĉe Pombro de l' baldakeno kun franĝoj, lumoj sin movis sur ŝia vizaĝo — rebriloj de l' lago vibranta sub la lumo. aŭ eble rebriloj de l' miloj da rigardoj direktitaj al ŝia rideto de tiel multaj jaroj. Post ŝi, marŝis junulinoj. Longa vualo el muslino, falanta malantaŭen, donis religian ĉarmon al iliaj kampaj vestaĵoj. Veroniko Nello antaŭeniris inter ili. Ŝia beleco dissemis admiran murmuron laŭlonge de tiu videma kaj gracia hombarilo formita de fremdulinoj elegantaj.

Kia vidaĵo por okuloj de artisto, kaj precipe en tia ornamo!.... Sed kiam tiu artisto estas amanto, apenaŭ savita de mortiga danĝero, kiun li altiris al si pro l' amatulino, kaj kiam l' amatino aperas antaŭ li kiel la mirindaĵo de tiu impresema sceno, ne nur la okuloj, sed la tuta animo entuziasmiĝas. Jako Ferneuil, savita de la Lakta Rivero, restadis tri semajnojn malsana en la lito. Centfoje, en sia deliro li retravivis la teruran minuton, dum kiu vidante Matteo'n ĉe l' fenestro apud lia fratino kaj timante ke li perforte agos kontraŭ la junulino, li estis rejetinta sin malantaŭen en la furiozon de l' torento. La morto?... Li akceptis ĝin. Tamen, malglataĵo de l' ŝtonego sin prezentis, ĝis kiu li sukcesis altiĝi. Kaj li tie restadis alkroĉiginta, duone neatingebla de l' ondo, preta por fali pro laceco ĉiunmomente. Kio estis tiuj horoj tion li poste ne povas kredi. Nek ĝuste scii, kiel li estis povinta kontraŭbatali la torenton, kaj eliri el ĝi, kiam fine Matteo, supozante ke li estis de longe englutita, donis signalon por deturni la lumjetilon.

Veroniko, la palpebrojn mallevitajn, marŝis antaŭ siaj kunulinoj. Iam forto levigis ŝiajn okulojn. Ŝi renkontis la okulojn de Jako. Li do vivis!.... Neniiga kortuŝeco igis ŝin pli pala ol ŝia vualo. Poste feliĉeco briligis ŝian ĉarman vizaĝon. Ŝi redirektis sian vizaĝon al la movema figuraĵo de l' sankta Virgulino kaj poste teren. Oni vidis nur la blankecon de l' vualoj. Ŝi estis pasinta. Iom poste, ili revidis unu alian. Tio okazis sur la placo de l' preĝejo. Veroniko ne havis plu sian vualon de l' procesio. Ŝi tenis en siaj manoj korbon plenan je granatoj kaj diantoj. Ĉirkaŭ ŝi, infanoj, junulinoj, virinoj, eĉ maljunuloj ŝargitaj de tiuj korboj, kiuj donas sian nomon al la festo, kaj kiujn plenigis floroj, fruktoj, kukoj, vivaj birdoj, pretiĝis por prezenti la donacojn de l' tero al la sankta Virgulino. Unu post alia, ili baldaŭ trairos la sanktejon kaj ricevos la benon de l' pastro. Poste, okazos l' aŭkcia vendo de l' korboj por la bezonoj de l' paroĥo.

— Veroniko, murmuris Jako, se vi volos, ni estos kunigitaj por ĉiam.

— Mia frato diris al mi, sopiris la junulino, ke franca artisto ne edziĝos je itala kamparanino.

Ĉu vi konas, demandis la junulo, la jenan kutimon de via lando: Kiam du gefianĉoj, sub la beno de l' pastro, elparolas la vortojn: Vi estas mia edzino.... kaj vi, mia edzo, se nur du ĉeestantoj tion aŭdas, ilia edziĝo estas nerompebla.

— Certe! ŝi diris, miranta.

— Ĉu vi volos elparoli tiujn ĉi vortojn kun mi, baldaŭ, laŭte, antaŭ l' altaro, meze de tiu homamaso ĉirkaŭonta nin?

L' admirindaj okuloj de Veroniko respondis. Kiam la sekvantaro ekmarŝis, la apudestantoj ridetis, vidante apud tiu rava junulino la junan francan pentriston, kies nomo jam iris de buŝo al buŝo, kaj kiu antaŭeniris, radianta, inter la portantoj de korboj.

Post momento, kiam la pastro levis sur ilin siajn brakojn, elparolante la ceremonian benon, oni aŭdis tra la tuta preĝejo viran kaj vibran voĉon:

— Vi estas mia edzino.

Kaj klara voĉo tremanĝa pro kortuŝeco kaj feliĉeco:

— Vi estas mia edzo.

La pastro, mirigita, ne estis mallevinta la brakojn. Laŭ la itala leĝo, Veroniko Nello estis la rajta edzino de Jako Ferneuil.

— Nun, diris la junulo, metante la manon de sia edzino sub sian brakon.... ni iru al nia frato Matteo. Kaj, feliĉega, la bela paro eliris el la preĝejo Veroniko tenis ankoraŭ en siaj manoj sian korbon da granatoj kaj diantoj. Longa ekkrio supreniris.

Tio estis l' amo salutita en tiu lando de l' amo. Eĉ la rideto de l' fremdaj skeptikuloj pense estingiĝis ĉe l' ekstremantaj lipoj. Ĉiuj virinoj havis larmojn en la okuloj: la virinoj havantaj tolan kufon, flavan koltukon kaj ruĝan jupon.... kaj ankaŭ la ceteraj, la fremdaj venintaj sur tiun mirandan lagon por serĉi la revon, l' aventuron.... aŭ la forgeson.

Fino.

Trad. kun permeso de l'aŭtorino,
de JOHANINO FLOURENS.

* Vidu la nojn 9, 10, 11, 12 de 1906.

Fervoj de Paris ĝis Lyon kaj la Méditerranée.

Biletoj iraj kaj reiraj de Paris ĝis la Svisa limo, liverataj kune kun kartoj je ĝeneralaj Svisaj abonoj.

La Paris'a stacidomo liveras irajn kaj reirajn biletojn 1^a kaj 2^a klasaj, uzeblajn 33 tagojn, por Genève, les Verrières-frontière (limo), Vallorbe-frontière kaj Villers-frontière (Sen reciprokeco).

Tiuj biletoj, vendataj 87 fr. en 1^a klaso kaj 64 fr. en 2^a klaso, ebligas iri de Paris en Suisse (Svisujon) per iu ajn el la limlokoj ĉi supre nomitaj, kaj reiri, ĉu je Paris-P. L. M., per unu ia el tiuj punktoj, ĉu je Paris-Est, per Delle-frontière aŭ per Bâle-Petit-Croix.

Ili estas liverataj nur al la vojaĝantoj kiuj haviĝas, samtempe, svisan abonon karton 15 = aŭ 30 tagan, uzeblan sur la ĉefaj fervojoj kaj Sipojoj svisaj.

La prezoj de l' ĝeneralaj abonoj svisaj estas la jenaj:

ABONO 15 TAGA: 1^a klaso: 85 fr. — 2^a kl.: 60 fr. — 3^a kl.: 45 fr.
» 30 » » 125 fr. — » 90 fr. — » 65 fr.

Tiuj prezoj enhavas garantisumon da 5 fr., kiu estas repagata je l' momento de l' redono de la karto.

GRAVA AVIZO. — Ĉiuj stacidomoj de l' fervojaro P. L. M. liveras kartojn por ĝeneralaj Svisaj abonoj 15 = 30 tagaj; ili liveras ankaŭ kartojn por ĝeneralaj Svisaj abonoj uzeblajn 45 tagojn, je l' jenaj prezoj (entenate la garantisumon da 5 fr.).

1^a klaso: 165 fr. — 2^a klaso: 115 fr. — 3^a klaso: 85 fr.
Por pluj sciigoj, vidi la Livret-Guide-Horaire P. L. M.

Petu en ĉiuj magazenoj de Genevo kaj de Svisujo la art-plenajn poŝtkartojn (Svisajn vidaĵojn).

Eldono Charnaux Fratoj kaj K^o, en Genevo.

Ekskursoj en Savoie.

Ekskursaj kartoj.

Estas liverataj, de l' 15^a de Junio ĝis la 15^a de Septembro, je la deiro de ĉiuj stacidomoj de l' fervojaro P. L. M., ekskursaj kartoj, individuaj aŭ familiaj, dopantaj rajton por la libera veturado, dum 15 aŭ 30 tagoj, en iaj zonoj de l' fervojaro, kaj aparte por Savoie.

Rondiraj vojaĝoj laŭ vojaroj difinitaj aŭ laŭvolaj 1^a, 2^a kaj 3^a klasaj.

Libertempaj biletoj je malpli grandigitaj prezoj liverataj de l' 1^a de Julio ĝis la 15^a de Septembro, al la familioj tripersonaĵaj almenaŭ.

Trairo simpla minimuma: 300 kil. — Laŭvolaj haltoj — Uzebleco ĝis la 1^a de Novembro.

Por pluj sciigoj, trarigardi la Livret-Guide-Horaire P. L. M., aĉeteblan po 0.fr50 en ĉiuj stacidomoj de l' fervojaro.

ANIAJ KONGRESAJ NUMEROJ

Kiel ni jam diris, ni preparas 3 kongresajn nojn. Ni konsilas al personoj dezirantaj akiri kelke da ili aŭ konsili ilian akiron, tuj mendi aŭ mendi tiujn numerojn, por eviti nesufiĉecon. Ni petas ĉiujn niajn amikojn bonvoli helpi je la disvastiĝo de tiuj numeroj, kiuj estos bonegaj propagandiloj: Aŭgusta, Septembra, Oktobra.

Ni jam ricevis proponojn por ilustraĵoj: ni plezure akceptos tiujn, kiujn oni bonvolos nin komuniki, kaj konsilas al la fotografantoj rapidigi la sendon. La lastan jaron, pro malfrua ricevo, ni ne povis enpresi multajn interesajn kongresajn vidaĵojn.

FRANÇOIS COPPEL

Unua Ĉapitro

de miaj memorskriboj

ESPERANTIGITA DE

AUGUSTE MOXTROSIER



PREZO: 75 CENTIMOJ

PARIS

ALPHONSE LEMERRE, ELDONISTO

23-25, PASSAGE CHOISEUL, 23-25

» GEECEK

Carma verketo de l' fama franca akademiano, kun antaŭparolo tute aproba por Esperanto.
Ĉe « Tra la Mondo ».

LA INTERNACIA TRINKAĴO!

Viskio Esperanto

Registered trade mark Marque déposée
No 270,012. No 13,195
Registered Label No 272,434

Bonvolu observi la verdan stelon kaj la nomon **ESPERANTO** sur la aŭŝeto, kiu estas desegnita kiel propagandilo.

Buchanan, Scott & C^o

GARTLAND STREET,

GLASGOW (Skotlando).

Telegrafa adreso: Esperanto - Glasgow.

UNUA JARO DE « TRA LA MONDO »

Bela volumo: 250 Ilustraĵoj. — Artikoloj pri 25 diversaj landoj de aŭtoroj el 20 malsimilaj nacioj.

8 frankojn. — Bindita 10 frankojn.

Belega premio al sukcesintaj lernantoj

Rekomendataj hoteloj. — Familia pensio Hagen, en Adelboden, Svisujo (prezo: 5-7 frankoj), malfermata la tutan jaron. « Tra la Mondo » legebla.

Unua anonco senpaga por niaj abonintoj.

Sinjorinoj!

Se vi volas ne plu suferi je la monataj sangel-fluoj aŭ je la epoko de ilia malapero, ensorbu la

DRAGÉES BLOTTIÈRE

sendangeran produktaĵon, bombonforman, kiu tuj kaj certe forigos la doloron. Por havigi la Dragées Blottièr, sendu 2.25fr. poŝt-aŭ kartmandate, 102, Rue Richelieu, PARIS

BUFEDO DE MACON KORESPONDAS ESPERANTE.

ANGLA-ESPERANTA LERNEJO POR KNABINOJ.

Tutjarloĝantinoj. Fraŭlino EVERDELL L. L. A. College House, Bridgwater, Somerset, Anglujo.

— Korespondas Esperante. —



FERVOJOJ DE PARIS—LYON—MÉDITERRANÉE.

MALKARAJ BILETOJ IRAJ KAJ REIRAJ JE SEZONO.

BERNE, INTERLAKEN, ZERMATT. (MONT ROSE—GORNERGRAT).

UZEBLECO: 60 TAGOJN.

	1 ^a klaso	2 ^a klaso	3 ^a klaso
De Paris al Berne. 1 ^e via (per) Dijon-les-Verrières, por la iro kaj la reiro	100 fr.	75 fr.	50 fr.
2 ^e via Dijon-les-Verrières, por la iro kaj via Délémont-Delle, Paris-Est por la reiro			
(aŭ reciproke) Interlaken (samaj vojaroj kiel al Berne) Biletoj liverataj de l' 1 ^a de Aprilo ĝis la 15 ^a de Oktobro	112 fr.	83 fr.	56 fr.
de Paris al Zermatt (sen reciprokeco) via Dijon-Pontarlier-Lausanne Biletoj liverataj de l' 15 ^a de Majo ĝis la 27 ^a de Oktobro	140 fr.	103 fr.	71 fr.

Tiuj biletoj estas uzeblaj, inter Viège kaj Zermatt, nur ĝis la 30^a de Septembro (ĉar la fervojo de Viège al Zermatt ne funkcias post tiu ĉi dato).

Laŭvolaj haltoj sur la tuta traire — 30 kil. da pakajo senpagaj sur la vojaro P. L. M. — Nenia senpageco en Svisujo.

Gazetaro.

Ni transsendas al la jenaj revuoj abonojn akompanatajn de la abonkosto. — Aldoni 10 centimojn por la transsendo de la mendo.

LA REVUO

INTERNACIA MONATA LITERATURA GAZETO KUN LA KONSTANTA KUNLABORADO DE
D^{ro} L. L. ZAMENHOF.

Tiu nova Revuo, tute redaktata en Esperanto, estos pure literatura; ĝi enhavos: novelojn, romanojn, poeziojn, komediojn, dramojn, seriozajn studojn pri historio, geografio, statistiko, popolmoroj, k. c. kronikon mallongan pri la ĉefaj mondaj okazintaĵoj, bibliografion.

Ĉio politika, religia, aŭ kio povus naski disputojn estos malakceptata de la Redakcio.

D^{ro} L. L. Zamenhof *sola* povos verki artikolojn pri la *lingvo*.

La 1^a numero aperos la 1^{an} de Septembro 1906 okaze de la 2^a Universala Kongreso de Esperanto.

KOSTO: ĈIU NUMERO 0 fr. 50.
JARA ABONO 6 fr.

Oni povas jam de nun aboni ĉe la Librejo Hachelle kaj K^o, 79, Boulevard Saint-Germain, Paris.

« ESPERANTO JOURNAL »

Eliras ĉiudimanĉe — France kaj Esperante.
Ĝin postulu en ĉiuj francaj stacidomoj kaj
ĉe libristoj — Unu numero 10 centimoj.
Abonoj, 24 numeroj: Franc- & Svislando: 3 fr.;
aliaj landoj: 3,75. Pago per poŝtmarkoj estas
akceptata je 10 % dealkulo.
Administranto de « Esperanto-Journal » en
Genève (Suisse) & Bellegarde (Ain, France).

L'ESPERANTISTE.

France kaj esperante redaktata, *oficiala* revuo de la S f p E: 24 paĝoj da teksto, 8 paĝoj da kovriloj kun multaj sciigoj pri la grupoj kaj ĉiuspecaj esperantistaj verkoj. ABONO: Francujo 3 fr.; alilande: 3,50 fr. Administracio: Louviers, (Eure), France.

GERMANA ESPERANTISTO.

Organo de diversaj germanaj grupoj esperantistaj (ĉiumonate). Redaktata germane kaj esperante. JARABONO: 3 f. 75 Administracio kaj Redakcio: Esperanto Verlag, Möller & Borel, Berlin, S., 95, Prinzen strasse.

LA BELGA SONORILO.

Bonega propaganda revuo: Esperante, france, flandre. Unu el la plej malnovaj kaj seriozaj gazetoj Esperantaj.

Sciigoj — Literaturo — Scienco

Eliras ĉiumonate. Abono: 4 fr. jare. Kolektoj de antaŭaj jaroj: 6 fr. Ĉe J. Coox, Duffel, (Belgique) kaj ĉe *Tra la Mondo*.

SUNO HISPANA.

Hispane kaj esperante. Abono 3 fr., unu numero 30 cent. Administracio kaj redakcio: Avellanar, 11, presejo — Valencia (España).

ESPERO PACIFISTA

Monata organo de l'*Esperantista Societo por la Paco*. Jara abono (aŭ minimuma kotizo al la Societo), 5 frankoj. Sin turni al S^{ro} Gaston Moch, 26 rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo).

THE BRITISH ESPERANTIST.

oficiala monata organo de la Brita Esperantista Asocio; 12 paĝoj da novaĵoj, k. c., anglo-Esperante, kaj 8 paĝoj da Aldono tute en Esperanto. Jare 4 fr. (sen Aldono 2 fr.) — Oni abonas ĉe la Sekretario de la B. E. A., 13, Arundel Street, Strand, London.

ESPERANTA STUDENTO.

Ĉiumonata gazeteto celanta interrilatigi kaj laborigi la gekomencantojn. Zorge eldonita skribmaŝine kaj kopimaŝine, kun spritaj plumdesegnaĵoj.

Jarabono: Granda Britujo: 2 s. 6 d.; Eksterlandoj: 3 fr.; unu kajero: 0 f. 25 c. Ĉe Fino Oxenford, 16, Upper Westbourne Villas, Hove, Sussex, England.

UNUA PAŜO.

Monata bulgara gazeto en Esperanto. Pri-traktas speciale bulgaraĵojn: morojn, literaturon, k. t. p.: jare, 3 fr.; duonjare, 2 fr. — Ĉe S^o S. Petkov, 26, Strato San-Stefano, Sofia, Bulgarie.

SVISA ESPERO.

France kaj esperante — 2 fr. — Ĉe Sinjoro Renard, 6, Rue du Vieux Collège, Genève.

LINGVO INTERNACIA.

Monata esperanta revuo. Fondita en 1895. Literatura kaj propaganda tute en Esperanto. Abono 7,50 fr. ĉiulande. Unu numero 0 f. 50. Abono estas akceptata de 1^o komenciĝo de ĉiu monato.

ANTAŬEN ESPERANTISTOJ

Hispane kaj esperante.—Organo de la Perua esperantista societo — 3 fr. — Administranto, Antonio Alvarado, apoteko del Teatro. Calle Lártiga, Lima (Peruo).

ESPERANTISTEN.

Svede kaj esperante. Organo de la Svedaj Esperantistoj, fondita de la Stokolma Klubo. Tre subteninda por helpi esperantistan movadon en Svedujo. Ĉe P. Ahlberg, 37, Surbrunnsgatan, Stockholm. 3 fr. 75 ĉiujare; aparta N^o: 35 cent.

RUSLANDA ESPERANTISTO.

Ĉiumonata organo de la S-to « Espero » en lingvoj Esperanta kaj parte en rusa — Diversspeca, interesa kaj bonstila literatura materialo: artikoloj pri la problemoj de lingvo internacia kaj pri Esperanto; vasta kroniko de Esperantista movado (propraj korespondantoj) kaj bibliografio; sociala politika fakoj; novaj famaj beletristikaĵoj (interalie en 1906 j. estos presata la « Ruĝa Rido » de L. Andrejev), versaĵoj kaj mult. al — La detalaj prospektoj estas riceveblaj, senpage. — La jara abonpago (kune kun membrigo en la S-to « Espero ») — 3 rubloj (7 fr. 50 cent.) — Adreso: Ruslando, *St Peterburgo*, B. Podjaĉeskaja, 24, al la S-to « Espero. »

JUNA ESPERANTISTO.

Tute Esperante-Divastigo de Esperanto ĉe la junularo — 2 fr. 50. — Redakcio: 9, Avenue des Vollandes, Genève (Suisse); Adm. 33, Rue Lacépède, Paris.

ĈILIO ESPERANTISTA

Senpaga organo propaganda, hispane kaj esperante. Ĉe S^o L. E. Sepulveda Cuadra, Casilla 1989 (Santiago-Chile).

ESPERANTO.

Hungare kaj esperante. Sciencia kaj literatura. 4 fr. ĉiulande. Ĉe S^o Marich Agoston, Papnóvelde-Uteza 6, Budapest, IV. (Hungarujo).

ESPERANTA LIGILO.

Monata revuo por blinduloj per esperanta Braille'a sistemo. 3 f. — Ĉe S^o Cart, 12, Rue Soufflot, Paris.

ESPERO KATOLIKA.

Tute esperante. Unu N^o afrankita 0 f. 50 Francujo, 4 fr.; alilande 5 fr. Presejo Barbot, 15, r. Etienne Pallu, Tours (France).

Les Annales politiques

et littéraires.

Jare: 10 f. — 15, rue St-Georges, Paris.

Abono: 10 fojojn repagita per la profitoj de l' « Carnet de la mutualité des Annales » (Libreto de l' reciproka apogo de Annales).

La plume Sténographique de France.

Universala revuo ilustrata de Stenografio kaj Daktilografio — D^{ro} L. P. Canet, Adm., 15, Rue Maigne, Limoges. — Ĉiulandaj sciigoj pri ĉio rilatanta la rapidan skribadon kaj la skribmaŝinojn; ĉiustistema stenografio, literatura kaj historia fakoj, ilustraĵoj, ludoj, k. t. p. **Petu specimenon.**

Belegaj propagandaj poŝtkartoj kun vidaĵoj de Algerio;

1 f., afrankite, ĉiu dekduo.

Propagandaj poŝtkartoj de « Tra la Mondo » fr. 1,50 ĉiu cento.

ĈE « TRA LA MONDO ».

GÉRANT: EUGÈNE CAFÉ.

A. J. WITTERYCK, Presisto, Bruĝo.